

OFFICIAL ORGAN OF

THE ESPERANTO ASSOCIATION  
OF NORTH AMERICA

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

## The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

### CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

#### BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

#### OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

#### SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall. F-ino Evelyn M. Rosher, 125a Beulah St. Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

#### MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

#### TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7. P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

#### WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanta Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thompson School, XIIth and L Sts., N. W.

Kolumbia Esperanto Unuigo. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

#### CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y. 1116 W. 19th Place.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave.  
Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

#### BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

#### WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

#### PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Miss Emma Sanborn, Sec'y, 16 Conant St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

Group Charter—\$1.00.

#### DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

#### HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun jaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimancon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres. Harry Hogrefe, Vice-Pres.

#### HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

#### NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Baro, or Esperanto Supper, is held on the third Friday of each month 6.45 P. M. Information from the Secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimancon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

#### CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

#### ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

#### PHILADELPHIA, PA.

Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo.. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

#### PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

#### MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

WEST NEWTON 65, MASS.

---

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

---

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

---

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

One Dollar a Year. Single Copy Ten Cents.  
Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

---

Vol. 27

April, 1921

No. 6

E. A. N. A. Congress—July 12th to 16th—Hotel VENDOME

Mornings, business sessions; afternoons, historical excursions.

Tuesday—Committees meet, evening, reception by Boston Club.

Wednesday Eve.—Propaganda Meeting, Boston Public Library.

Thursday—Spertularo Day.

Friday—Banquet in evening.

Saturday—Plymouth, Pageant in evening.

Sunday—Services in a Boston Meeting-house.

(All Esperantists are invited to Barco at Boston Club, April 30, to elaborate this program.)

---

### LATE NEWS

The International Red Cross Congress just held at Geneva, has voted that Esperanto shall be learned by all the national Red Cross societies, for use in their international congresses.

---

### —BE UP TO DATE—

1921 Esperanto Calendar blotters at 2 for 5 c., 100 for \$1.00

Let here be no public writing desk without one!

A Great Time Saver — Good Quality — Best of Propaganda

[Hereafter the wholesale price of this number will be 12 for \$1.00.]

Al la Spirito de la Patroj Pilgrimantaj!  
Gov. Coolidge, Plymouth, Dec. 31, 1920

Antaŭ hodiaŭ tricent jarojn la Pilgrimantoj de la "Mayflower" fine alterigis ĉe la Stonego de Plymouth. Ne nur el la marbordo de la Malnova Mondo ili venis. Vane oni serĉus tra konataj landkartoj kaj historio por eltrovi devenon ilian. Ili velveturis el la nescieblo.

Inter ili estis malmulte da postsigno de vivaj vantajoj. Ili venis ne portante nobelecajn ordenojn. Idoj ili estis, ne de la fortuno sed de la malfeliĉeco. Persekuado, ne prefero, ĉi tien ilin kondukis. Tamen, tiu estis persekuado kiu kontentigis iliajn severajn mensojn. Malmulte ili ŝatis titolojn, eĉ malpli la terajn havajojn, sed pro ideo ili volus morti.

Mezuritaj per la homaj normoj de ilia epoko, ili estis la malgranduloj de la mondo. Mezuritaj per postaj elfaroj ili estis la potenculoj. Ili venis ŝajne malfortaj kaj persekitaj, forjetitaj, malSATATAJ—malgrava aro, sed vere forta kaj sendependa, potenca aro, kiun la mondo ne meritis, destinita liberigi la homaron. Nenia estro iam sian armeon kondukis al tia venko. La rangon ili ne taksis, tamen de ili homoj elsercas sian devēnon kvazaŭ de rega familiaro.

Povoj ne homregataj estis aranĝintaj ilian malvolan vojon. Dum ilia surterigo, dia gardanto, de stato pli malalta, pli proksima al la naturo ol ili mem, ilin bonvenigis per ilia propra lingvo. Ili venis serĉante nur teran vivlokron, "sed suprenlevis siajn okulojn al la cielo, plej kara lando sia." skribis Koloniestro Bradford, "kie Dio estas preparinta urbegon por ili." Sur tiu daŭra fido estas fondita imperio eĉ pli grandioza ol iliaj songoj pri cielo mem.

Meze de la soleco ili starigis fajrejon kaj altaron; la hejmon kaj la preĝejon. Ili eltiris siajn vivrimedojn el la tero portante armilojn. Portante armilojn ili are kunvenis por fari adoron al Dio Ciopova. Sed ili sin armis por ke ili povu pace serĉi dian gvidadon al virto; ne ke ili povu perforte venki, sed ke ili povu juston fari eĉ kvankam ili pereus.

Kia kreskado materia kaj spirita, alvenis al tiu areto dum tricent jaroj, tion la tuta mondo bone scias. Neniu simila aro iam tiom grande influis la homaran historion. Civilizacio estas sanktiginta ilian surterigejon. Al la Commonwealth de Massachusetts estas konfidita la gardado de tiu sanktejo. Al ni estas veninta la valorega heredajo. Gi estos konservata tia kia gi estas kreata aŭ gi pereos; ne kun monda fiereco, sed kun ĉielo idealismo.

La Stonego de Plymouth signas nek komenco nek finon. Gi signas malkašon de tio kio estas senkomence kaj senfina, celo brilanta tra la eterneco kun arda lumo, ne malheliga eĉ per homaj neperfektaoj, kaj kiel redono, responda celo, de tiuj kiu malkonante, malestimante ĉion alian, ĉi tien velveturis nur por elserci vojon por la senmorta animo.

El Union Bulletin tradukis Roger Goodland.

Gov. Coolidge's Tribute to the  
Spirit of the Pilgrim Fathers

Three centuries ago today the Pilgrims of the Mayflower made final landing at Plymouth Rock. They came not merely from the shores of the Old World. It will be in vain to search among recorded maps and history for their origin. They sailed up out of the infinite.

There was among them small trace of the vanities of life. They came undocked with orders of nobility. They were not children of fortune but of tribulation. Persecution, not preference, brought them hither. But it was a persecution in which they found a stern satisfaction. They cared little for titles, still less for the goods of this earth, but for an idea they would die.

Measured by the standards of men of their time they were the humble of the earth. Measured by later accomplishments they\* were the mighty. In appearance weak and persecuted they came, rejected, despised, an insignificant band, in reality strong and independent, a mighty host, of whom the world was not worthy, destined to free mankind. No captain ever led his forces to such a conquest. Oblivious to rank, yet men trace to them their lineage as to a royal house.

Forces not ruled by man had laid their unwilling course. As they landed, a sentinel of Providence, humbler, nearer to nature than themselves, welcomed them in their own tongue. They came seeking an abiding place only on earth, "but lifted up their eyes to heaven, their dearest country," says Governor Bradford, "where God hath prepared for them a city." On that abiding faith has been reared an empire magnificent beyond their dreams of paradise.

Amid the solitude they set up hearthstone and altar; the home and the church. With arms in their hands they wrung from the soil their bread. With arms they gathered in the congregation to worship Almighty God. But they were armed that, in peace, they might seek divine guidance in righteousness, not that they might prevail by force, but that they might do right though they perished.

What an increase, material and spiritual, 300 years has brought that little company is known to all the earth. No like body ever cast so great an influence on human history. Civilization has made of their landing place a shrine. Unto the Commonwealth of Massachusetts has been intrusted the keeping of that shrine. To her has come the precious heritage. It will be kept as it was created, or it will perish, not with earthly pride, but with a heavenly vision.

Plymouth Rock does not mark a beginning or an end. It marks a revelation of that which is without beginning and without end, a purpose, shining through eternity with a resplendent light, undimmed even by the imperfections of men, and a response, an answering purpose from those who, oblivious, disdainful of all else, sailed hither seeking only for an avenue for the immortal soul.

## LA PRAPATROJ PILGRIMAJ

afable tralegis E. S Payson

## ANTAŪPAROLO

(de N. W. Frost)

Antaŭ tricent jaroj la Pilgrimantoj venis al Norda Ameriko por tie starigi komunumon kie la ŝtato ne regas ekleziajn aferojn. Demokrataj religie, iliaj demokrataj metodoj estis disvastiĝontaj tra religio kaj ŝtato tra tuta Ameriko.

Antaŭ du cent jaroj estis kreskinta en Anglujo la spirito de ribelado kontraŭ Romo. Wycliffe (Ŭiklif) estis la elparolanto de tiu ribelado; favorata de la reĝo li serĉis rezonojn por la nacianeco de la eklezio. Efektive la demandon oni estis longatempe diskutanta, ĉu la nacio aŭ la "Sankta Imperio Roma" devas esti la aŭtoritato pri homaj aferoj, sed ĉe Wycliffe oni diskutis ĉu la papa aŭ la reĝa moŝto rajtas ordoni al la nacia eklezio. Cie elserĉante la tekstojn, Wycliffe tradukis anglalingven la sanktajn skribajojn, kaj multaj el la tieaj dirajoj de tiam estiĝis komunaj popoldirajoj. La mallatinigitaj vortoj instigis multajn al reformemo. Tamen pasis la reĝa bezono por popola helpo, kaj tiujn tro scivolemajn ordinarulojn oni kondamnis kaj malliberigis kaj mortigis, ĝis preskaŭ ne restas herezano ekster la ŝafaro. Spite tion, oni rememoris post longe ties argumentojn kaj reuzis ilin ĉe la popolo.

Aliaj kaj pli rektaj influoj tendencis al disiĝo de la Roma eklezio. De la unuaj jarcentoj de Kristanismo troviĝis en la Roma imperio personoj kiuj kredas firme en la potenco de la diablo kaj liaj anĝeloj. La doktrinojn ne necesas studi, ili estis elfluo el la dualismo de persa Zoroastrianismo, kiu, kombinita kun Kristanismo kaj aliaj kredaj elementoj, estis nomita Maniheismo. El Maniheanoj devenis Bogomiloj\*, Katarinoj, Patarinoj, ktp., precipice notindaj inter la slavaj popoloj laŭlonge de la Adriata Maro. Tiujn ankaŭ oni formortigis. Post longe aperis Johano Hus en Bohemio; li predikis kontraŭ la aŭtoritato papeca (tiutempe, ĝis 1417, dum longaj jaroj troviĝis du, kelkfoje eĉ tri, rivalaj papoj, kaj gravegaj koncilioj de la tuta ekleziestraro devis kunveni por purigi kaj repacigi la eklezion). Inter aliaj aferoj Hus argumentis kontraŭ enkorpiĝado de Kristo en la Eǔkariston. Hus' on kaj helpanton lian Jerome' on oni bruligis, sed la Bohemoj dum jarcento venkis kaj rebatis la forton de la Sankta Imperio Romana.

La aŭtoritato de la reĝoj tiutempe kreskis tiom ke okazas baraktoj inter ili kaj Romo. Oportunajn helpantojn la reĝoj trovis ĉe la pensuloj. En Hispanio, Ferdinando kaj Isabella enkondukis reformadon de la tiea eklezio. En Italujo Savonarola provis instigi reformadon per revolucio, sed lin oni stangobruligis. Jen aperis la presado de libroj kaj bildoj plenaj de ĉia ideo. Von Hutten kaj Erasmus kaj multaj aliaj pensuloj atakis la "Skoliastojn" per argumento kaj satiro, ankaŭ presigis la Evangelion en la originala greka mem. En Francio Lefevre kaj Farel predikis la antikvan dogmon de Aǔgustino, savadon de infero per kredo (anstataŭ per bonaj agoj), kaj la moštaro de la regno favore ilin aǔskultis.

\* Vidu Krestanov—Bulgara Lando kaj Popolo—por pli longa priskribo de Bogomilismo.

Luther estis sendube la komencanto de la Reformado. Luther estis germana monaĥo, filo de malnobeluloj; fervora kaj lerta predikisto. Romo, dezirante amasi monon por konstrui grandiozegan urbbon, sendis en Germanujon vendantojn de indulgencoj, kiuj malhonante religion trompis la popolamason. Luther kontraŭpredikis ilin kaj alvokis la papan moșton, sed ĉi tiu volis silentigi nur la indignan monaĥon. Luther, per tio konvinkita, denoncis la papecon, kaj rapide eltiris novajn dogmojn el la Biblio, kiun li starigas kiel aŭtoritaton sola: kelkaj germanaj ŝtatestroj subtenis lin. La partianoj de Luther ne kontentis resti tiel, multaj por si mem interpretis la sanktajn tekstojn. La mondo estis tumultema; la kampanaro, sen rajtoj kaj malriĉigita per novaj financa, komerca, kaj porluksa postulaĵoj de la superuloj, sin levis kontraŭ siaj mastroj, petante socian reformadon. Tion Luther kondamnis kaj la nobeluloj sangege subpremis la ribelandon. Religio estu, laŭ li, afero de la regnistroj, ne de la individuo, ne de eksterpatruja papo. Ĉe dogmo Luther grave ŝanĝis la kredon, nur du el la sanktaj oficoj li subtenis, la Euchariston kaj baptadon; la ceremonion li plejmulte konservis.

Zwingli, samtempa reformanto en demokrata Svisio, estis pli logika kaj tutkora reformisto. Li argumentis antaŭ la popolo mem kaj denuncis ĉion en la tiama eklezio kiun la Biblio ne klare sankciis. Estis maljuste partopreni ludojn aŭ trinkadojn; oni severe punadis blasfemon kaj ĉiun alien deflankiĝon de la rekta mallarĝa vojo. Oni malpendigis la bildojn, la krucifiksojn, la statuojn el la eklezio, oni bruligis la restaĵojn, silentigis la muzikilojn, surblankigis la pentritajn murojn. Jen, efektive, la spiritaj antaŭuloj de niaj Pilgrimoj.

Calvin daŭrigis kaj disvastigis tra Francio la laboron de Zwingli. Li starigis modelan ŝtaton en Genevo, hierarhan ŝtaton. El tiu devenis parohoj regataj de "sinodoj" (el pastroj) aŭ "presbiteraroj" (el maljunuloj). Oni perforte postulis ĉeestadon je la kultceremonioj, simplecon je vestado, kaj faris krimaj vetludon, dancadon, kaj blasfemon. Herezulon apartan oni bruligis.

Nun ni revenu al la okazantaro en Anglujo mem post la tempo de Wycliffe kaj lia sekventaro, la "Lollardoj." En la longaj militjaroj "de la Rozoj," la popolamaso neatentis religiajn diskutojn. Oni estis tute bone katolikaj en Anglujo. Nur financa neceso renovigis la movadon kontraŭ la eklezio. Henry VII Tudor estis ŝparema avarulo; per tiel nomitaj "benevolences" (mal)-"bonvolaj donacoj," de la plej riĉaj siaj subuloj, li amasigis kaj lasis al la filo 1,800,000 funtojn. Aŭtokratulo, li malpermisis apelacion al Romo de iu ekleziulo angla. Henry VIII, heredanto kaj sekvento, estis travivinta la junecon ĉirkaŭata de novpensuloj, sed sur trono li argumente defendis la aŭtoritaton de la papeco. Spite tion li ne amis alien aŭtoritaton ol la sia kaj kiam Katarino de Aragonio, lia edzino, ne naskis al li filon, li serĉis alien patrinon de heredonto sia. Ordinare Romo sufice kompleze akceptis la petojn de reĝoj en tiaj okazoj, sed nun Romo, sin taksinte kaj sin reforminte, ne volis cedi kontraŭ la volo de Katarino, ĉasta reĝido de povega Hispanio. Tamen Anne Boleyn, subtenata de ambiciaj parencoj postulis edziĝon de la reĝo, moșta amanto sia. Ĉi tiu

ne longe atendis, sed furiozega, forpelis la romajn senditulojn, per fortis juĝon maledzigan de ekleziana juĝantaro, forhakigis la kapojn de kontraŭuloj kaj de tiam edziĝadis laŭvole. La eklezio de Anglio devis timigite obe al tirano. Tamen la reĝo mem malmulte difektis la dogmojn. Henry VIII estis malsparema, li baldaŭ elspezis la hereditan monsumon, kaj nun serĉis kie trovi alian. La monaĥejoj kaj eklezioj estis la plej riĉaj trezorujoj en Anglio kaj multe da ilia riĉajo estis luksajoj, juveloj, aŭ oro mem, pretaj al rabado. De antaŭ longe la malriĉaj frataroj denuncis tiun hontindan luksecon. Henry ordonis al la monaĥaroj ke ili disigu sin, kaj iliajn landojn, iliajn havajojn, li aŭ rabadis aŭ donis al la rabado de siaj subuloj. La popolamaso brue ĝojis pri la afero. Per la "Akto de Supereco," 1534, la angla parlamento transdonis tute la papajn rajtojn al la reĝo. Tamen, Henry VIII malmulte sin ĝenis pri dogmoj.

Inter la popolo vagadis novajojn portantaj vojaĝistoj, ili priparolis la novajojn de la Protestantoj en Germanujo kaj Francio kaj Svisio. "Cu vere la Biblio estis la sola kontrolilo? Cu la papo aŭ ĉu tiu tia reĝo estas rajte estra de la Kristanaro? La ideoj venis per presajoj eĉ al la malriĉuloj. Jen novaj pensoj por la pensemaj!—danĝeraj pensoj! Tamen, malmultaj volis riski sian savadon per tiuj danĝeraj novajoj. Ankaŭ la kapon oni riskus per parolado hereza. Kvankam malmultaj, tamen tiuj "Puritanoj" (Purigemoj) kiuj celis forigon de la romaj restajoj, ekzistis obstine. Inter ili, kelkaj, la "Separatistoj," (Apartigemoj) deziris ankaŭ tute forigi la ŝatan el ekleziaj aferoj.

Je la morto de Henry VIII, lia filo sola, Edward VI, estis dekjarulo, kies patrinaj parencoj sukcesis forteni ĉiun povon kaj laŭvole diki la religion ŝtatan. Unue, regis la duko de Somerset, kiu krevigis la statuojn kaj la bildajn fenestrojn de la preĝejoj kaj eldonis preĝlibron—(eĉ Henry VIII estis ordoninta en ĉiu parohejo tradukon de Biblio)—laŭ la luterana penso. Post li la duko de Warwick, favorante la preĝanton John Knox, eldonigis preĝlibron laŭ la Zwinglia penso, permisis la largajn diskutojn de Crammer kaj Latimer, kaj kiam venis la morto al la reĝo, intrigis por starigi sur la tronon Lady Jane Grey. La popolamaso indignis kaj fervore salutis reĝinon Mary, fervoran katolikon, kiu restarigis la modojn de Henry VIII kaj celis reeniri la roman ŝafaron. Gis nun la nacio celis nur obeema, sed nun venis nova incitilo.

La Reĝino edziĝis kun Filipo de Hispanio—Hispanio, kiu minacas konkeri la tutan mondron, kaj kiu subtenas ĉie la inkvizicion kontraŭ herezuloj, kontraŭ ĉioma herezulo! Oni eĉ vidis la superregemajn hispanajn soldatojn sur la stratoj de Londono, tiujn kiuj nun sanggege albatalas la reformulojn de Germanujo. Nun ili pašegadas tra la stratoj de Londono—jen hontinda afero! La reĝino redonis la eklezion al la papo, oni perforte revenigis ĉion al la katolika ŝtato antaŭ Henry VIII, ĉion krom la rabbitaj landoj, kiujn tenas fortaj nobeloj; oni komencis stangobruligi la herezajn ĉefojn. Vanaj provoj! Multaj Protestantoj ĉiuspecaj devis forsteliri al la kontinento; sed la popolamaso oni efektive konvertis al Protestantismo. De tiam estas senŝange decidite ke Anglujo ne apartenu al la romia eklezio. Baldaŭ venis novaj kialoj.

Elizabeth, sekvanto de Mary, estis saĝa ŝtatestrino. Si revenigis la ceremoniojn de Edward, sed ŝi ne perforte gvidis la nacion, fakte ŝi kompleze sed nevole permesis al la plimulto de la nacio monpuni aŭ mortigi la herezanojn laŭ volo ĝia. Elizabeth celis trankvilecon, ŝi tute ne deziris purigadon de la eklezio, reformadon spiritan de la popolamaso. Eble la nacio, kun sia intereso al la vivkondiĉoj kaj la festoj, la ursoturmentego, la iom malĉastaj pensoj kaj ludoj, baldaŭ estus forgesinta la problemon religian, se ne transmaraj okazoj vivigadis ĝin. Maristoj, ktp., portis terurigajn rakontojn pri la hispana inkvizicio, kaj en apuda Skotlando okazis okjara religia barakto. La partio de la Guise, subtenata de la hispanoj, komencis eksterminadon de la francaj "Hugenotoj" (liganoj protestantaj) kiujn en multegaj urboj oni forpelas, rabadas, kaj mortigas sen kompato. La interŝtata politiko intermiksis kun tiuj militoj. En Nederlando la hispanaj Guberniestroj, kolerigitaj de ekscesoj de Protestantaj Nederlandanaĉoj, pli kaj pli provis subigi la herezon. Efektive ili sukcesis forpeli ĝin ĝis la maro sed tie ĉi la ŝipanoj liberaj sur la akvo sukcese kontraŭstaris la registaron. Filipo sendis la Inkvizicion kaj oni komencis regadon sangegan, sed Alva kaj hispaniaj armeoj ne sukcesis superi la surakvigitajn poldrojn\* kaj jarojn post jaroj daŭris la milito feroca. En Francujo samtempe inter la sangegaj militoj okazis la perfida amasbuĉado "S. Bartholomea," kiu kaŭzas tremegon naŭzan al la popolo angla ĉi tiam simpatia al la hugenotoj.

Nur du-tri-foje la afero rekte tuſis Anglion, ĉe la afero de Maria, reĝino forpelita de Skotlando, kaj ĉe la gravega venko super la Armada, venko kiu malfermis la oceanon Atlantikan al ŝipoj kaj kolonioj. Elizabeth celis pacon kaj pli kaj pli la angloj estis fermantaj la orelojn al la vekrioj de fremdoj kaj serĉantaj amuzon kaj riĉecon.

Eble se la ekonomia stato de Anglio estus restinta kamparana, oni baldaŭ estus reveninta al la fidelo. Sed tiutempe venis Anglujon pli kaj pli da oro hispana. La nobelulo hispana, riĉiginta per rabado de la nova mondo, revenis al la patrujo por tie vivadi sen laboro per oro sia. Li bezonis konsumajojn; la ekstera mondo bezonis la mone-rojn, per industrio kaj komerco serĉis akiri ilin. La fluo de mono estis tre rapida; la monprezoj altiĝis. Prezoj vestaja ktp, dekobliĝis. Jen la kamparano angla plejmulte pagis ĉart-fiksitan sumon ĉuijare. La nobeluloj terposedantaj, nun ĉe luksa kortego, ne povis sufice enspezi laŭ tiuj malnovaj lupagoj; anstataue oni forpelis la necedeman famiston kaj sur la tero malkulturata paſtis ŝafojn kies lanon oni povas vendadi laŭ novaj prezoj. Eĉ la komunan vilaĝpaſtejojn ili ĉirkaŭbaris de la vilaĝanoj. La eksfarmisto devis elserĉi novan logejon; novan okupon. Ofte li migris al la urboj kaj tie komencis fabriki teksaĵojn. Alvenis el Francujo lertaj hugenotaj ankaŭ flandraj teksistoj, ĝis baldaŭ la lanajo de Anglujo estas vaste disvastigata. En la urboj mento renkontis menton, kaj la oftaj malegalaj vivkondiĉoj elvekis pensadon. Oni ne riverencis la aŭtoritaton de reĝo aŭ ekleziestro. Povis sin kaſi ĉe ili vagantaj herezaj pastroj, novaj doktrinoj. Spite de la ŝtataj persekutadoj disvastiĝis tiaj ideoj nekonformaj al la postulataj dogmoj. Grupoj komencis diskuti kaj klarigi por si mem la Biblio.

\* Poldro—kampo sub nivelo de la maro.



## La Prapatroj Pilgrimaj

OUR PILGRIM FOREFATHERS

Charles Stedman Hanks

(ĉiuj rajtoj rezervitaj)

tradukita kun permeso de N. W. Frost (iom mallongigita)

### NASKIGO DE KONGREGACIISMO

Jam en 1576 oni konis la "Separatistojn" kiel apartan sekton, tion multe efektivigis Robert Browne, unu el la plej progresemaj defendantoj de siatempa religia libereco. Ido de riĉa kaj povega familiaro, kaj diplomito en 1570 de Cambridge, li komencis prediki, "por satigi al sia devo kaj sia konscienco," li diris. De sia legado de la Evangelio li konvinkiĝis ne nur ke la Kristanismo de Kristo kaj Lia apostolaro estis religio pli simpla ol tiu de la ŝtruktigita eklezio, sed ankaŭ ke iu Kristanularo rajtas laŭ sia propra modo propagandi Kristanismon. Enlokiĝinta je Norwich, li komencis viglajn penojn por la Evangeliaj principoj, denove, li kredis, trovitaj de li. Ĉar de tio rezultatis persekutoj, Holandon elmigris lia malgranda kongregacio de Norwich. De Holando iris Browne kaj iom da sekvantoj siaj Skotlandon, kiun ili trovas preskaŭ tiom malamika kiom Anglio. Pliposte Browne revenis Anglujon kie oni lin malliberigis dum tempospaco, sekve li ja pacigis sin kun la ŝtata eklezio, ricevis la pastradon de paroheta kongregacio, kaj tie restis ĝis morto.

Al tiuj kiuj aniĝis liajn doktrinojn, oni donis la nomon "Brownistoj," kaj pro la problemoj de li traktitaj li estas fondinto de "Kongregaciismo" (Congregationalism). La principoj argumentitajn li estis forte montrinta, ankaŭ li estis petinta la popolon ke ili ne atende esperu ke la civila potenco, aŭ eklezia registaro permesos reformadon, sed mem ekenkonduku ĝin kie ajn ili sin trovas. "La Regadon de Dio"—li skribis—"ne po tutaj parohoj komencu, sed plibone la plej indaj! Ordoni religion; per potenco starigi eklezion, perforte subigi al la regado eklezia per leĝoj kaj punoj nek al ŝtato nek al eklezio taŭgas." Liajn sagojn plej akrajn li direktis kontraŭ tiuj pastroj kiuj malvolis iel ekpaŝi laŭ propra respondeco sen konsento de la civila registro.

Al la plimulto de la Puritanoj multaj el liaj doktrinoj ŝajnis tro radikalaj: ĉar ili celis ne forlasi sed resti anoj kaj gvidi la eklezion, ili rigardis timege kaj malaprobatante tiun troan radikalon kiu kompreneble malcertigos ilian sukceson kontraŭigante ilin antaŭ la Reĝo.

La broshuroj de Robert Browne daure rondiradis, kaj la Separatistoj nun havis porbatalanton malpli lertan, sed pli fortan je karaktero. Tiu Henry Barrowe, kiu defendos la principojn de Separatismo per la ekstrema argumento, martiriĝo, estis ankaŭ altrangulo. Dum liaj kolegianaj tagoj je Cambridge li diboĉadis, diplomitan lin interesis la juro. Unu dimanĉon veninte kun kamarado li aŭskultis bonekonatan Separatiston, John Greenwood, kiu predikas la doktrinojn de Separatismo; la vortoj aŭditaj tiom impresis Barrowe ke novaj pensoj ektrudis en lia mento. Sindetene nature, tiu ĉi diboĉulo junu, bonekonata en Londono kaj en fremdaj landoj, subite renversis sian vivadon, kaj komencis severecon vivadan kiu vekas la komentadon miran de liaj konatuloj ĉiuj.

Studado de la Evangelio kondukis lin preter la doktrinojn de Robert Browne, kaj baldaŭ li estis senkaše vokanta al la principio ke la doktrino de tolerado sekvas logike Separatismon. Jen nova doktrino kaj la gvidantoj de pensado baldaŭ rimarkis ke en la progreso de popolaj liberecoj estus gravege ke oni disigu la potencon eklezian de la civila aŭtoritato. Pliposte ne longe oni enkarceris Greenwood pro esprimado sia de opinioj Separatismaj, kaj kiam Barrowe lin vizitas oni ankaŭ malliberigis ĉi tiun eĉ sen arrestletero. Tro bone konataj estis lia nomo kaj karaktero ke la oficiroj permesu lin forkuri pro nur teknika malleĝajo. Dum kvin jaroj ambaŭ restis en karcero, tamen dum tiu tempo ili sukcesis skribadi multe da verkoj kiujn kaše presigis iliaj amikoj. Plene ili sciis sian riskon, sed religiaj konvinkoj estis iĝintaj pli karaj ol vivo, kaj je 1593 ambaŭ atestis tiujn konvinkojn je pendigilo.

Du monatojn post ilia martiriĝo, sammaniere mortis alia bonekonata Separatisto, John Penry, studinto je Cambridge kaj ankaŭ je Oxford. Ĉar la spirita kondiĉo de liaj samlandanoj kimraj flagrigis lian indignon, li akrege estis mallaŭdinta la aliloke loĝantan klerikaron, dirinte ke kleriko kiu neniam predikas ne estas vera pastro de Kristo. Pli poste estis li iĝinta Separatisto; ne nur sentime predikinta siajn kredojn, sed per propra presilo presinta la doktrinojn Separatismajn. Tiutempe de nekonata ejo senanonce traktajoj komencis aperadi kiuj montras la malrajtaojn de la tiutempa Eklezio kaj subpremadoj. Plenaj je personaj aludoj, iliaj malrespektajoj estis groteskaj; la skandalojn ekleziajn oni larĝe skizis. Ĉiuj legadis ilin—kor-teganoj, politikistoj, kaj kamparuloj. La studentoj de la universitato sub la robon ilin kaŝintaj pri ili kaše ridegis. Ĉiu portis la subskribon "Martin Marprelate." John Penry oni opiniis la verkanto ĉar oni scias ke li posedas presilon kaj ke li de antaŭ longe disvastigas religian literaturon kiu bruligas kaj brilas. Do dum la episkopo sekvas la severan politikon persekutadan por tute forigi malkonsenton, dum ili plenigas la karcerojn per Separatistoj kaj Nekonformantoj—la malliberejo sole estas al ili preta—ili eksiciis ke la mondo je ili ridadas. En tiu dilemo ili devis ekzempligi iun, tial Penry mortis per la pendigilo pro alvokado al libero kulta, libera presado. En tiu barakto kontraŭ tiraneco eklezia Barrowe, Greenwood, kaj Penry estis farantaj historion Anglian, kaj je iliaj mortoj sian unuan antaŭenpuson ricevis Kongregaciismo.

## LA KONGREGACIO JE SCROOBY

La martirado de Barrowe, Greenwood kaj Penry pensigis pli ol unu anglon pri tiu religio kiu faris homojn volantaj per siaj vivoj subteni ĝiajn principojn. Rezultatis ke multaj Puritanoj en Londono kaj la orientaj kaj sudaj graflandoj konvertiĝis al la progresegaj doktrinoj kaj starigis kongregaciojn Separatismajn. Baldaŭ poste la Separatistoj en Norda Anglio organizis sin kaj je 1605 oni starigis kongregacion en Gainsborough, tiama centro de forta tiea partio Puritana. Ĉi tie dejorataj de John Smith, diplomito de Cambridge kaj genia predikisto, diservoj okazis en halo de la biendomo de William Hickman, kies edzino estas entusiasma Separatisto. Sekve, en 1606 versajne, pro persekutado, forkuris John Smith kaj kongregacio lia al Holando, kie oni elmartelas liberecon civilan kaj religian je tempo kiam aŭdiĝis tiaj sonoj preskaŭ nenie aliloke en Eŭropo. Tiun saman jaron William Brewster, loĝanta en Scrooby, kaj William Bradford de Austerfield, vilaĝeto norde de Scrooby, starigis kongregacion je Scrooby, kunvenantan ĉe Brewster: baldaŭ la kongregacio tiom grandiĝis ke oni devas okazigi la servojn en la apuda stablo. Jen la eklezio, kiu, travivanta ĉiujn persekutadojn, estos praavo de la eklezio kongregaciisma (Congregationalist) kaj tiuj kultantoj de Scrooby estis devenontaj niaj "Pilgrim"-oj, la efektivaj starigontoj de nia respubliko.

Car la domo de Brewster troviĝas je limo de la vilaĝo, apude al la "Granda Vojego," estis speciale taŭga por kaŝaj kunvenoj. Gi staris sur bordo de rivereto, estis tiel ĉirkaŭita triflanke per ĉirkaŭfosajo ke oni povas atingi ĝin nur per tirponto apud vojo al vilaĝo. La domo apartenis al bieno de la ĉefepiskopo de York. Interne de tiu fosajo ankaŭ troviĝis antikva palaco, praava konstruajego forlasita kaj rapide ruiniĝanta.

Apud tiu palaco troviĝis la domo en kiu tiutempe loĝas Brewster, pli nova, bonstata konstruaĵo; tiu estis la biendomo nun kiam la palaco ruiniĝas. Dum multaj jaroj oni uzis ĝin kiel unu el la poštstacejoj registaraj por oficialaj aferoj, kaj, ĉar ĝi staras apud unu el la kvar grandaj ĉefvojoj de la regno, ofte la intendanton konatiĝis kun notinduloj vojaĝantaj pri ŝtataj aferoj. Tie ĉi la patro de Brewster estis estinta ŝtatpoštstacio kaj intendantanto; tie ĉi nelonge post la surtronigo de Reĝino Elizabeth, naskiĝis Brewster, kiu tie ĉi trapasis la knabecon. Studinte iom da tempo je Cambridge, li ricevis ĉe William Davison reĝina ŝtatsekretario, postenon, kiu irigis lin al Londono, kie li multe vidis la vivadon korteganan. Tie loĝinte, li akompanis Davison je ambasadorado al Holando, oni tiom estimis lian laboron ke brila kariero politika malfermiĝas antaŭ li. Mallonge post la reveno, tamen, Davison malfavoriĝis; Reĝino Elizabeth lin faris propekulo por ke ŝi evitu sian respondecon kiel subskribinto de la mortigmandato de Mary, reĝino skotia. Tio finis la karieron politikan de Brewster, kiu revenas al Scrooby. Post nelonge mortis lia patro, kaj li ricevis la patran poštpostenon—postenon kiu lin faris vilaĝa ĉefulo kaj eminentulo de la vilaĝa kongregacio.

William Bradford, kiu aliĝis kun Brewster la Scrooby kongregacion, estis tiam deksepjarulo plijuna po dudektri jaroj ol Brewster. Lia hejmo troviĝis en Austerfield kun unu onklo lia, ĉar lia patro mortis kiam li apenaŭ havas unu jaron, al li lasante suficān heredajon. Same kiel la patro la du onkloj de Bradford estis prosperaj farmistoj, sufice eminentaj inter la najbararo, tial Bradford heredis pli ol ordinara kapableco de kampara junulo, ankaŭ kredeble ricevis pli ol la kutima edukado de vilaĝa knabo.

Estris la Scrooby kongregacion Richard Clyfton, severa, patreca homo, kiu per sia pia vivado konvertis multajn al Separatismo. Dum kelkaj jaroj li estis estinta pastro de la vilaĝa preĝejo de Babworth 7 mejlojn sude de Scrooby, sed la postenon estis perdinta, ĉar li rifuzis subskribon al la kanonoj de la eklezio Anglia; tiam senkompare postulatan. Poste li eniris la movadon Separatisman kaj de la Scrooby kongregacio estis ĝia spirita admonanto.

Baldaŭ post la organizo de la kongregacio li trovis kiel kolegon John Robinson, denaskiĝa loganto tiuloke, kies nomo fariĝos, pro lia nobla karaktero kaj larĝa intelekto, bonekonata en du kontinentoj. Robinson tiam havis trideksep jarojn; li posedis neordinaran analizokapablon ĉe aferoj teologiaj kaj notindan genion ĉe aferoj civilaj. Kiam li lasis kolegion li pastreciĝis en la ŝtata eklezio sed de komenco konscience dubis pri la pastraj roboj kaj ceremonioj postulataj. Tiuj duboj fine kaŭzis ke oni malpastrigis lin, kaj rezultate li iĝis pastro de kongregacio je Norwich kie "li gajnis la korojn homajn al si kaj al vero." Pro lia influo post nelonge oni ekskomuniigis Norwich-anojn pro tio ke ili "kunvenas kaj pregas kun John Robinson, viro riverenata de la tuta urbo pro la Dia Graco en li." Kiam fine oni komencis lin turmenti per monpunoj kaj malliberado, li juĝis pliprofite al la kongregacio ke li fordonu la pastradon. Baldaŭ poste sin organizis la Scrooby kongregacio kaj li aliĝis al tiu ĉar ĝiaj doktrinoj allogis lin kiel pli akordaj kun lia kompreno de la Evangelio ol tiuj de la aliaj kongregacioj Separatistaj.

Kun tiaj estroj estis certe ke la Scrooby-anoj nelonge restos trankvilaj. Antaŭ komenco de tiuj persekutoj, tamen, kreskis inter Bradford kaj Brewster amikeco, kiun en malnova kaj en nova mondo egos la komunaj malfacilaĵoj; la komunaj suferoj. De ambaŭ viroj la spiritoj en nova mondo povege estis impresontaj la popolon usonian. Antaŭ la organizo de la kongregacio Scrooby mortis Reĝino Elizabeth, regiĝis James I. Je lia surtronigo okcent klerikuloj prezentis al li sian famekonatan "Millenary Petition," petantan ke oni reformigu la eklezian juĝojn; ke oni formetu la uzadojn superstiĉajn sankciigitaj de la Preĝlibro; ke oni pli severege efektivigu la dimanĉleĝojn; ke oni havu pli da lertaj predikistoj; ke oni formetu surplicon kaj krukadon ĉe la baptado; ke oni uzu la ringon ĉe la edziga ceremonio. Responde diris la reĝo al la episkopoj, "Mi ilin konformigos, aŭ mi turmentos ilin for de la lando,"—kaj unu el liaj episkopoj solene certigis la reĝon ke li tiujn vortojn diris inspirita de la Sankta Spirito.

Sub Episkopo Bancroft oni de tiام ĉasis kaj persekutis nekonformantojn ĉiu loke. Fine, kiam la registaro ekscriis ke William Brewster estas Separatisto, oni forigis lian postenon poštoficistan, eldonis arrestleteron "kontraŭ William Brewster el Scrooby, ĝentilulo, pro Brownismo." El la Scrooby Separatistoj "iujn oni kaptis kaj malliberigis, de aliaj oni tage kaj nokte spionis la domojn; la plejmulto deziris forkuri kaj forlasi domojn kaj okupojn siajn." William Bradford ankaŭ serĉis la reĝaj oficiroj kaj laŭ tradicio unufoje kiam lin serĉis oficiroj, li evitis arrestadon kaŝita en kupra kaldronego en kelo ĉe si.

Plejparte la Scrooby-anoj senkompare elcasataj kaj malesperante pri trankvila vivado en sa patrujo, decidis trans la maron iri Hollandon, kie trovas religian liberecon ĉiuj, kaj kien multaj Separatistoj estas forkurintaj el Londono kaj aliaj lokoj. Kvankam estas lando kie ili devos lerni novan lingvon, kie ili devos vivumi\* sole per negoco kaj komerco ne konataj al ili farmistoj, "ili volis oferi sian tutan heredajon por kontroligi siajn agadojn laŭ sia nova vivadplano."

Post kelkaj nesukcesaj provoj de forkurado po du kaj po tri, oktobron, 1607, decidintaj iri are, ili kaše luis ŝipon en ŝipigi ilin je Bostono, la havenurbo plej proksima. Oni scias ke la ŝipestro perfidis ilin kiam ĉiuj estis sur ŝipo, ke la aŭtoritatuloj forprenis de ili ilian monon, kaj pliparte ilian havajon. Poste oni venigis ilin antaŭ la magistratojn Bostonajn, kiuj tenis ilin unu monaton, sekve enkarcerigis sep gvidantojn inter kiuj Brewster, en la ĉeloj de la antikva Gildhalo ĝis jugado de pli alta jugantaro, la aliajn resendis al Scrooby. Pri la jugiĝo de tiuj homoj je la supera rondira tribunalo oni nenian registron trovas sed oni scias ke, la sekvantan printempon, kiam ankaŭ unufojon ili provas forkuri, Brewster kaj la aliaj estas jam revenintaj al Scrooby. Ni do divenu ke ĉar ilia malliberigo faradis konvertojn al ilia kredo, oni jugis oportune forigi la procesojn kaj liberigi la homojn.

Nun ili devis uzi ekstreman kašemon pri la planado iri Hollandon—ĉiuj estis pretaj je momenta avizo foriri, kaj kiam holanda ŝipestro de Zeelanda marbordo troviĝas je Hull kiu volas riski en ŝipigadon de la patruij-forkurantoj, ili kontraktis kun li ke li transportu ilin. La loko de kiu ili planas ekiri estis dezerta ejo je bordo de la Humber-a rivero, proksima al ties elfluo. Tie la rivero estis preskaŭ kvin mejlojn larga, Holando rekte oriente malproksima de tricent mejloj. Tie etendis mil akroj ( $400\text{Hm}^2$ ) da firma tero apud kies Grimsby-a flanko troviĝas mallarĝa enirejo pliposte nomota "Mollie Brown's" Golfeto. Tiu loko malapudas Scrooby po 36 mejloj kaj ĝis Thornton Abatejo ekzistas bonstata ŝoseo sen iu urbo preter Gainsborough. Ankaŭ estas profito ke oni povas atingi la lokon per akvo ĉar la rivero "Idle," fluanta tra la herbejo oriente de Scrooby elfluas en la Trent-an 5 mejlojn preter Gainsborough, kaj la Trent-a en la Humber-an, 18 mejlojn antaŭ tiu golfeto.

Car necesas malordinaraj antaŭzorgoj por sin gardi kašataj, oni decidis sendi la virinojn kaj infanojn kune kun la portotajn havajojn laŭ la rivero dum marĝas la viroj tere. Enregistraĵoj sciigas ke la boato kun virinaro kaj infanaro malbrue ekiris nokte laŭ la Idle kaj ke sekve la viroj ekmarĝis trans kampoj po du kaj po tri ripozantaj de

\* vivumi—gajni la rimedojn de vivado.

tagiĝo ĝis ree noktiĝis sufice por sendanĝera marŝado. Tiu irado verŝajne pasigis tri tagojn kaj ĉar, pro tajdo, la boatvojaĝo elspezis ĉirkaŭe la saman tempon, kredeble ĉiuj renkontiĝis je Mollie Brown's Cove la saman tagon.

Tie ĉi la lastan fojon en Anglujo, la prapatroj Pilgrimaj suferis persekuton; kaj, kvankam ĉi tie staras hodiaŭ al ili neniu rememorigilo, je tiu loko Brewster kaj liaj akompanantoj decidis la sorton de la nacio usona. Oni scias ke alvenintaj vane ili atendis la ŝipon kiu portus ilin al Holando, ankaŭ ke kiam venis la nokto la boato kun virinoj kaj infanoj surteriĝis en la golfeto pro la tajda forfluo; ke la ŝipon oni fine vidis venantan laŭ la rivero kaj ke de ĝi oni faligis la ankron kaj sendis al tero la ŝipboaton. Oni scias la sekvajn okazajojn ke oni tuj enŝipigis iom da viroj; ke la ŝipboato ekrevenis ankoraŭ por dua ŝargo kiam ekvidiĝas infanterio kaj kavalerio sekvataj de najbara popolo alvenintaj trans la montetarojn; ke la ŝipboato tuj reiris al ŝipo, kaj la ŝipestro timante areston levigis ankron kaj forveturis per favora vento por Holando. La virinoj kaj infanoj ankoraŭ en la surteriĝinta boato en la golfeto, vidis, ekveturantajn siajn edzojn, sciis ke ilin mem oni malliberigos. Estis dolorege! Dum la ekskitiĝo kelkaj el la viroj forkuris surtere laŭlonge de la riverbordo, la aliaj restis por helpi kiom ili povas la senhelpajn virinojn.

Jen gravega momento en la vivoj de tiuj! Unufoje antaŭe ili estis provintaj forkuri kaj malsukcesintaj; en tiu superstiĉa epoko ja povis sanceli iliaj pensadoj, ĉu, efektive Dio ne malaprobas tiun ĉi barakton ilian kontraŭ la neevitebla. Estis unu el tiaj sanceligaj tempoj kiam fortaj spiritoj regas la malfortajn, kaj oni scias ke Robinson kaj Brewster sukcessis instigi al ĉiuj ke ili subtenu la novan persekuton sen subiĝo.

Je Mollie Brown's Cove lá estonta historio de Ameriko sancelis; tiuj kelkaj horoj apud la Humber estis tiom gravaj en la formado de ties historio kiom la pliposta enŝipiĝo de Delft haveno, la kontrakto signota en kajuto de la Mayflower, aŭ la surteriĝo je Plymouth roko—scenoj ofte pentritaj, sed kompare nur detaloj en la vivado de tiuj. Ni scias kiel finis la tago—ke oni malliberigos ilin kaj donis al ili liberecon nur post rapida transigado de loko al loko; de unu al alia oficisto, el kiuj ĉiu siavice ĝojegis liberiginte sin de ili. De tiu tempo unuj de unu loko, unuj de alia, ĉiuj sukcessis atingi Holandon, tiel fendante la ceneron kiu ligis ilin al la pasinteco.

#### LA KONGREGACIO EN HOLANDO, 1608—1620

Alveninte Holandon tiuj Scrooby elmigrintoj decidis lokigi sin je Amsterdam ĉar tiu estas havenurbo kie ili povas facile trovi okupadon kaj ĉar la partianoj de John Smith kaj aliaj Separatistoj sin ekzilintaj ĉiuj por sama afero tie troviĝas. De tiuj kiuj veturnis per la holanda komercŝipo kaj jam tie troviĝas oni ekskriis ke la ŝipo apenaŭ forlasis la vidon de Anglujo kiam ventego pelis ĝin malproksimen laŭlonge de la bordo norveguja kie apenaŭ ĝi ne subiris en la ondega maro kelkfoje. Unufoje eĉ la ŝipestro kaj ŝipanaro malesperiĝis pri savo, sed post dekkvar tagoj fine oni atingis Holandon senmonaj kaj sen alia ol la portata vestaĵo.

Tamen, en la nova vivado kaj ĝuado de paco kun libereco, oni rapide forgesis la estintecon. Aliaj ol religiaj ligiloj ilin nun kunligis ĉar nun ĉiu konas la spiriton de la aliaj kaj memorojn pri la persekutado pro anima libereco oni perdis en la triumfo de sia celado.

Kvankam ili sin trovis en lando kie ili povas kulti libere laŭvole, iliaj vivrimedoj estas malmultegaj, kaj ili devige faris hejmojn en la plej aĉa kvartalo de la urbo. Kelkaj loĝis ĵe piedirejo kvarfutlarga (1.3m.) kiu vojas inter Brandesteeeg Strato kaj alia strateto larĝa dekdu futojn (4m.) kie loĝas plejmulte la aliaj, strateto per kiu oni atingas Achtenburgwal strato. Antaŭ longe nun estas iliaj hejmoj for, sed restas la sama arĥitekturo holanda; restas la ehoj mem de tiuj lokoj, malfortaj kaj malproksimaj hodiaŭ rememorigas tiujn urbanojn kun konusaj ĉapeloj, blankaj kolumegoj, ondantaj manikoj, kaj ĝisgenuaj pantalonoj, ĉiam kontentemajn de sia sorto, ĉiam volantaj laborantoj kiel havenportistoj aŭ dungitoj de komercistoj kaj negocistoj.

La Protestanta movado kontraŭ Katolikismo laŭ Romo antaŭ longe surpasis Holandon, kaj dum 1579 kiam Amsterdam alprenis la reformon religian, oni transdonis la preĝejojn katolikajn al partianoj de la nova credo. En unu tia preĝejo la Brownistoj restantaj en Hollandon nun kultis kaj pro malkonsentoj kiuj aperis je 1600, kelkaj el tiuj ĉi Brownistoj apartigintaj sin nun kultis en magazeno—ankoraŭ staranta je angulo de la du piedirejoj kie dek jarojn poste ekloĝis la Pilgrimoj. Kun tiuj John Smith kaj liaj alvenintaj Holandon ligis sin kaj kune kun ili kultis nun la Scrooby-anoj.

La teologiaj opinioj de tiuj ĉi kultantoj ne ankoraŭ firmiĝis kaj diskutoj inter la Brownistoj kaj la Smith-anoj ofte okazis. Arminius Amsterdamulo tiam estis predikanta malkonservemajn doktrinojn je la Lejdenna Universitato. Kiam John Smith komencis priparoli similajn doktrinojn la Brownistoj forigis lin kaj lian sekvantaron de la kongregacio. Tiuj ekzilitoj logigis sin je Lejden kie influataj de Arminius—tiu post unu jaro mortis—kaj de lia posteulo Episcopius, ili malapartigis. La Scrooby-anoj dume kultadis kun la Brownistoj, sed Robinson kaj aliaj prudentuloj el ili baldaŭ eksiciis ke Brownismo pli kaj pli aliformiĝis de siaj doktrinoj kaj oni komencis timi enmiksadon religion. Ankaŭ tiamaniere edukitaj en enlandoj vilaĝoj Angliaj, ili ne taŭgis al la vivado de komerca urbo kie kutimoj kaj lingvo estas al ili strangaj. Tial, kiam malriĉeco komencas pli kaj pli ilin premi, oni decidis, post unu jaro en Amsterdam, translokigi sin al universitata urbo Lejden, ĉar en tiu trankvilejo enlanda ili pli probable povas havigi ŝatatan okupadon. Kelkaj, tamen, restis en Amsterdam kun Richard Clyfton, kiu komencis konfidi al malpli demokrata ordo eklezia.

Tiuj kiuj venis Lejdenon enlogiĝis apud katredalo de S. Petro, antikva romia katolika preĝejo, sed post la reformado holanda reforma. En ĉambio kontraŭa al tiu katredalo ĉi tiuj Separatistoj nun kultis laŭ la simplaj principoj kiujn iliaopinie instruas la Nova Testamento.

Tiom tiuj ĉi nun firmiĝis en la doktrinoj Kongregaciismaj ke ili ne timis deflankiĝon per la dogmoj de Arminius kion jam ili pruvis en la disputado inter Brownistoj kaj John Smith. John Robinson, nuna

gvidanto ilia, estis jam montrinta notindan kapablon kiel direktanto de iliaj aferoj civilaj; pli ol unufoje sukcese defendinte publike la pravecon de ilia credo, li estas gajninta famon kiel teologo kaj la respekton eĉ de la universitatuloj. La negocistoj Lejdenaj ankaŭ ne malfrue eksiciis ke la religio ties faras pacemaj, honestaj, kaj laboremaj urbanoj. Kiam tiuj Separatistoj baldaŭ kreskas al graveco, la bonsukceso de la kolonio ekfamis preter Holando kaj ekaltiris Hollandon Separatistojn el ĉiu parto de Anglo.

Dum ilia tiea restado, alvenis multaj kiuj pliposte estiĝos eminentaj en Ameriko. Inter tiuj ĉi Edward Winslow, junulo nelaborista, kiun veturant en Holando tiom impresis iliaj doktrinoj ke li decidis sidiĝi ĉe ili; ankaŭ Myles Standish, libera soldato, kiu alvenis Nederlando en la armeo Elizabeth-a. Al Robinson, Brewster, Bradford, kaj tiuj du viroj ŝuldas ne nur granda nacio sed ankaŭ la civilizita mondo ŝuldon neniam repageblan.

Malmulte oni scias pri iliaj jaroj senokazaj en Lejden. Por helpi en la kreskanta laboro de la kongregacio, oni faris William Brewster presbitero; ĉiudimanĉe kaj dufojojn dum la semajno John Robinson predikis la doktrinojn de ilia credo en ilia preĝejeto apud la domo kie li logas. Ili estis venintaj al Holando baldaŭ post la komenco de dekdu jara milithalto inter holandanoj kaj hispanoj—la du tiam plej fortaj marpotenco de la mondo. Nun kiam preskaŭ finiĝas la militpaŭzo, la registaro holanda komencis viglajn preparojn por la rekomencota milito. Cie troviĝis militistoj kun armiloj, kaj kun tiuj milit-preparoj eble oni enarmeigos ĉiun fortkorpan viron. Pro tio Robinson kaj la aliaj opiniis ke nun oni devas ne nur submeti sin al la sorto, ĉar se ili disiĝus, la plenumita laboro donus neniu rezultaton; kaj eĉ se tiuj ne maltrankviligus ilin, oni poveble, ili timis, persekutos ilin pro ilia religio, se Hispanio konkerus la landon.

Neniuj sciis plibone ol tiuj reformantoj mem ke la mondo ne estas preta akcepti ilian religion. Al tiuj ĉi kies konsciencoj ilin perforis al fordono de ĉio por ilia religio, de nenia projekto estis tro dangera la elprovo. Estis brava plano, tamen, kiun la gvidantoj desegnas kiam ili decidas ke sole en la okcidenta mondo inter popolo neligita al antauĝoj de la Antikva Mondo povas ili certigi sin pri libereco ĉe credo religia sia. Kiel poste skribos Bradford—"Esperon grandan havis ili kaj fervorion internan por ke ili starigu ian bonan fundamentojn aŭ almenaŭ pretigu iome la vojon al propagado kaj progreso de la Evangelio de la Krista Regno en tiuj malproksimaj mondpartoj, eĉ ja se ili estos nur ŝtupstonoj al aliaj por efektivi tiom grandan laboron." Pro aliaj kaŭzoj ankoraŭ ŝajnis tiu movo dezirinda. Dum la jaroj kiam ili restas en Holando ilia idaro estis submetita al la malpuriga influo de urba vivado. La dimanĉon al ili tiom karan, oni malkaše maltrankvilis, milita servo nun tentegis ilian junularon; kaj precipe ili timis ke ilia idaro fine ensorbiĝos per edziĝado kun la holandanoj.

Al la plimulto de tiuj Separatistoj tiu projekto de kolonio starigota en okcidenta duonmondo ŝajnis malpraktika, ne nur ĉar aliaj kolonioj tie malsukcessis, sed precipe ĉar mankas al ili la necesa mono por ekipigi vojaĝon. Tamen, venkis la juĝo de la malmultaj, kaj oni

decidis lokigi sin aŭ ĉe la holandanoj en Gujanio Sudamerika, aŭ ĉe la angloj en Nordameriko. La libro eldonita en 1596 de Raliegh kiu entuziasme priskribas Gujanion kiel landon de konstanta somero kie ĉio kreska abundas, efikis sur ili; tamen, post multe da disputado, ili decidis ke ne estas dezirinde vivadi kie la klimato estas tiom varma. Ankaŭ oni timis ke, se ili lokigos sin en Holanda Gujanio, la hispanoj povos ilin amasbući same kiel oni amasbućis la Hugenotojn en Florido. Kontraŭe ili scias ke se ili starigos kolonion en Norda Ameriko eble oni persekutados ilin same kiel en Anglio. Ĉar, tamen, multaj opiniis ke la reĝo donos al ili liberecon religian, oni decidis komenci negocadon kun la Virginia Kompanio pri landpeco sufice proksima al la kolonio Virginia por havi helpon kontraŭ dangero.

Ili estimis sin kiel pilgrimantojn similajn al la krucmilitirantoj al Palestinio, kaj "ke, eĉ se oni perdos la vivojn en tiu agado, malgraŭ tio oni povos sin komforti pri ĝi, kaj ilia celado estos honesta;" tial ili sin nomis "Pilgrims" (Pilgrimantoj). Dum dekdu jaroj ili estis vivintaj distance po mallonga veturado de siaj antikvaj hejmoj, kie ili ne devus barakti la malriĉecon; sed tiel ili estis firmigitaj ke neniam ili ŝancelis, kaj ke nun ili estas pretaj al elprovado de la nova projekto. La volonte travivitaj malfacilaĵoj estis ilin preparintaj kontraŭ la Amerika dezerto, kaj ankaŭ estis en ili evoluinta tiun kapablecon por praktika, prudenta, kaj ŝparema laboro sen kiu ilia provo koloniigi estus malsukcesonta.

La Anglia regno, kiun la sorto destinis ke ili konkeros, jam estis bonekonata lando. Eĉ en 1574 anglaj ŝipoj estis komencintaj ĉuijarajn vojaĝojn al la Malprofundejoj de Newfoundland por fiŝoj kaj en 1588 kvar cent diversnaciaj ŝipoj tie fiŝkaptadis. En 1602 Bartholomew Gosnold starigis nesukcesan kolonion je Kapo Ann. Veturante de tie trans la golfo de Massachusetts li trovis Kapon Cod tiel nomitan de li pro la granda provizo de gado kiun li vidis; sed dum li projektis kolonieton tie oni forlasis lian kolonion je Kapo Ann. En 1603 Martin Pring el Bristol faris negocvojaĝon al tiu regiono, kaj en 1605 Champlain vizitis la Novanglian marbordon. En 1607 sub konduko de George Popham kolonieton oni starigis je elfluo de la rivero Kennebec; tiun pro la severa vintro oni forlasis la sekvantan printempon. En 1609 tiun saman regionon Novanglian vizitis Henry Hudson vojaĝante laŭ vojo al esplorado de la Hudson rivero; kaj en 1614 post dekdu monatoj de trankvila vivado en Anglio Kapitano John Smith antaŭe de la Virginia kolonio, kun du ŝipoj kaj kvar anglaj komercistoj vizitis tiun regionon por negocado. Ankaŭ la francoj starigis kolonion je Quebec; kaj eĉ en 1616 anglaj fiŝsaladejoj kaj peltnegocejoj estis starigitaj je la marbordo de Maine; la insulo "Monhegan" estis bonekonata renkontejo de anglaj fiŝistoj. Dum la sekvantaj du jaroj kelkaj ekspedicioj organiziĝis en Anglujo por esplori tiun marbordon novanglian, el kiuj la plej grava estis tiu de Sipestro Dermer, kiu restas en tiu lando preskaŭ tri jarojn, pasigante kelkajn monatojn je la bordo de Kapon Cod kaj esplorante la havenojn de Plymouth kaj Barnstable. Lia esplorado de la Plymouth-haveno nur po ĉirkaŭe unu jaro antaŭdatis la alvenon de la Pilgrimantoj.

Je tiu tempo la komerca kompanio ĉartita de Reĝo James I por koloniigi anglan Nordamerikon sin dividis en du kompaniojn; unu kun Londona ĉefsidejo nomitan "la Kompanio de Suda Virginio," al kiu oni cedis la sudan parton de Norda Ameriko; la alian, nomitan, "la Kompanio de Norda Virginio," kun ĉefsidejo je Plymouth, al kiu oni cedas la teritorion de la latitudo de Nov-Jorko ĝis la kolonieto de Quebec. En la cedoj al tiuj ĉi du kompanioj oni kondiĉis ke devos resti cent dezertajn mejlojn da teritorio inter la du.

Estro de la Plymouth Kompanio estis Sir Fernando Gorges, kies firmo estas komencinta kun da kapitalo tro malmulte por elprovadi planojn kiuj necesas tujajn elspezojn, kaj preskaŭ de la komenco ĉi tiu kompanio volis pligrandigi sian enspezon per luado aŭ vendado de eroj el ĝia teritorio. Post mallonga ekzistado tiu Plymouth kompanio, pruvita finance nesukcesa, vendis siajn rajtojn al nova kompanio kies aganta ano estas Gorges. Tiu ĉi nova kompanio nomita, "La Konsilantaro por Nova Anglio," ricevis novembron 1620, reĝan ĉarton al landoj ĉiuj de Long Branch, N. J., ĝis golfo de Chaleur, N. S.

Ja antaŭ tiu tempo sendis la Lejdena kongregacio du el sia anaro, John Carver kaj Robert Cushman, al Londono por negocadi kun la Suda Virginia Kompanio pri cedo el ĝia teritorio. Pro la tiama konkursado je koloniigado ili facile akiris promeson de cedajo; tamen, de la reĝo ili povis havigi nur lian privatan konsenton al libereco religia sen la aŭtoritateco de reĝa sigelo. Pro tio multaj el la kongregacio hezitis pri la ekentreprenata ekspedicio; tamen oni argumentis ke, eĉ se la reĝan promeson pri religia libereco konfirmigus sigelo tiel vasta kiel planko de domo, li trovus ian vojon malefektivigi sian promeson se tion li dezirus.

Car la plimulto el ili, tamen, opinias ke oni ne ilin maltrankviligos, Carver kaj Cushman oni resendis al Londono por finigi la negocon, kaj akiri posedakton al terpeco sub kondiĉoj kiel eble plej favoraj. Plie ili uzu siajn plejajn provadojn interesigi siajn Angliajn amikojn je la entrepreno, por akiri la monon necesan al ekipado de la ekspedicio kaj por allogi Londonajn negocistojn ke ili kunigu sin kun la entrepreno kiel komerca eksperimento.

Dum oni tiel negocadas, la estraro de la Kompanio de Suda Virginio dividiĝis en malamikajn partiojn kaj pro la rezultata konkursado, oni ne povis tiutempe fini la negocon. Kiam aferoj tiel neprogresis en Londono oni komencis negoci kun iuj holandaj komercistoj kiuj posedas negocejon je Manhattan (hodiaŭ New York). El tiuj rezultatis propono al Robinson, ke oni ne nur transportos lian kongregation al sia negocejo, sed ankaŭ provizos ilin per bestaro, protektos ilin dum ke ili tion bezonas, kaj permesos al la kolonio memregadon ĉe aferoj lokaj. Satita de tiuj kondiĉoj, Robinson petis promeson de protektado de la registro holanda, kies pretendojn al tiu lando disputas Anglio. Dum negocado kun la holanda registro, Carver kaj Cushman ricevis de la Londona Kompanio cedajon landan, kaj revenis al Lejden kune kun iu Thomas Weston, Londona komercisto, kiu, kune kun sepdek aliaj anglaj komercistoj estas proponintaj pruntedoni la monon necesan por la ekspedicio, car ili esperas multe profiti

de la fiŝado kaj peltnegocado. Laŭ la projekto de Weston, oni formas akcian kompanion kies kapitalon oni dividis en akciojn po dek funtoj; al ĉiu migranto oni donos unu akcion kiel lian porcion de la propraĵo, kaj du tagojn ĉiusemajne por laborado por si mem; fine, je fino de sep jaroj oni dividos la posedajojn de la kompanio same kiel ĝiajn enspezojn inter la akciuloj ĉiuj. Ĉar la registaro holanda dume rifuzis kontrakti la necesan protektadon, oni subskribis tiujn ĉi artikolojn de interkonsento. Tiu ĉi asociado kiu kostos al la Pilgrimaj Gepatroj sep jarojn de laboro estis verdire ilia transportpago. La negocadon plenumintaj, Carver kaj Cushman oni resendis al Anglio por preni la propontan prunton subskribitan de la Londonaj komercistoj. Dume tiuj kiuj estos la unuaj pilgrimantoj komencis vendadi sian propraĵon, por havigi la monon enspezotan en la entreprenon.

Multaj Separatistoj de Anglio nun decidis aligi sin al ili, kaj al unu el tiuj Christopher Martin el Essex, oni petis aranĝadi laŭ neceso kun Carver kaj Cushman. Malfeliĉe, dum oni ordigas tiujn detalojn, iuj el la komercistoj kiuj estas promesintaj partopreni rifuzis estiĝi akciuloj. Por influi ke aliaj ne malpartoprenu, Cushman konsentis kun Weston ke tiun parton de la kontrakto kiu lasas al ĉiu koloniano du labortagojn ĉiusemajne por li mem oni forstreku, kaj ke la tuta laborado apartenu al la kompanio. Dume la Speedwell ŝipeto de 60 tunoj da ŝarĝo, kiun oni aĉetis kaj ekipis en Holando, restis je la kajo en la haveneto de Delft en la rivero Maasa du mejlojn kontraŭflue de Rotterdam; oni intencis ke post la vojaĝo oni uzos ĝin por fiŝkapta boato.

Fine ĉio aranĝiĝis, piloto sendita el Londono por direkti la Speedwell al Anglio alportis leteron de Cushman, kiu diras ke la Mayflower, ŝipo de 183 tunoj estas luita, kaj post kelkaj tagoj ekiros de Londono al Southampton, kie tiuj venantaj el Lejden renkontos ĝin. Pro la malgrandeco de la Speedwell oni elektis nur la plej fortajn pilgrimaj pioniroj, kaj oni decidis ke John Robinson restu kun la plimulto kiu restos en Lejden; ke William Brewster iru kiel estro de sendependa kongregacio en la nova kolonio, ke Bradford, Winslow kaj Standish akompanu lin, kaj ke se sukcesos la eksperimento do la lasataj entreprenos la minacan vojaĝon.

Kiam alproksimiĝas la tempo de foriro de Lejden, multaj alvenis el Amsterdam por adiaŭi tiujn en ŝipiĝantoj en entrepreno kies hazardon ĉiu konas, ĉiuj celis kaj doni kaj ricevi kuragigon por sia kaŭzo komuna. Tiun tagon someran en aŭgusto, la lastan de ĉi tiuj "Pilgrim"-antoj en Lejden, oni trapasis en sia pregejeto fervore pentante Dian gvidon. Ĝis Delft Haveno estis veturo ok-hora laŭ kanalo, kaj multaj al Lejden alvenintaj por diri lastan "Benu Dio!" nun veturnis ĝis Delft Haveno por tie partopreni la finan adiaŭon. Tie ĉi, kiel skribis Winslow, "ili ankoraŭ nin festenis," kaj en la frua mateno sekventa ĉiuj kunvenis sur la kajo, kie donas John Robinson siajn lastajn admonon kaj benon.

Jen tempo de malĝojo, tamen, kun la doloro troviĝis la scio ke tiuj ĉi pioniroj fordonis amikojn siajn pro sento de devo. Kiam veliris el la haveneto kaj laŭ la rivero al maro, larmoj plenigis ĉiun okulon, kaj sur ŝipo kaj sur tero, kaj kiam John Robinson falinta sur la genuojn pregas kun brakoj etenditaj kaj kun superfluataj okuloj por

ilia savo ĉiu genufleksis ĉirkaŭ li. Eĉ la fremdoj holandaj, altiritaj de scivolemo, ne povis reteni la proprajn larmojn kiam ili rigardas ĉi tiun disiĝon kiu tiom profunde skuas ĉiun koron.

Mallonga estis vojaĝo al Southampton kie la May Flower kun la Separatistoj el Londono kaj iuj laboristoj sendataj de la Londona akciularo atendas. Ĉar en la Speedwell estis troa amaso por vojaĝo trans Atlantika, multaj el ĝiaj veturantoj transiĝis en la alian ŝipon. Nuntempe oni ne timis persekutadon, ĉar dum iliaj dekdu jaroj en Hollando, malakriĝis la religiaj antaŭjuĝoj kontraŭ ili, sed novaj malfacilajoj neatendataj ilin kontraŭstaris.

Weston, kiu venis por vidi la foriron, nun insistis ke ĉiu konsentu al la ŝango farita de li kaj Cushman en la kontrakto, kaj, ĉar ili rifuzis tion fari sen la konsento de tiuj en Lejden, li rifuzis doni al ili la cent funtojn necesajn por havigi iliajn vizajn dokumentojn kaj kolere reiris Londonon. Pro ĉi tiu dilemo ili devis vendi la plimulton el siaj butero, oleo, kaj ŝuledero, ankaŭ multaj el la glavoj kaj muskedoj sendataj por uzado en Ameriko, kaj pro tio devis foriri kun ekipaĵo tro malgranda por la vojaĝo aŭ por starigi kolonion. Malmulte ili tiam taksis la gravecon de foriro devige tiom malsufiĉe provizita, tamen, ilia okaza citado de ĝi kiel nur detalo rilate al ilia foriro, konigas al ni la elcerpitajn staton de ilia rimedo.

\* \* \*

### LA SIDIGO JE PLYMOUTH, 1620

Kiam la Pilgrim-antoj foriris de Southampton ili progresis laŭlonge de la suda bordo Anglia. Ni scias ke en ambaŭ ŝipoj multajn la maro malfartigis, kaj ke unu nokton kiam la ŝipestro de la Speedwell diras ke akvo enfluas sian ŝipon, ambaŭ ŝipoj eniris la havenon de Dartmouth por riparado. Post dek tagoj ankoraŭ oni ekiris sed kiam ili trapasis tricent mejlojn de Land's End (landfino) la ŝipestro de la Speedwell anoncis sian ŝipon nemartaŭga kaj ree ambaŭ ŝipoj revenis al Anglio kaj ankre haltigis sin en Plymouth haveno. Oni scias ke la plejmulto el tiuj kiuj alvenis de Londono senkuraĝigita forlasis la vojaĝon, ke aliaj ekseniis ke ilia religia inspiriĝo ne sufice fortigis ilin por kontraŭstari la marnaŭzon; kaj ke inter tiuj kiuj lasis la veturadon troviĝis Cushman kaj lia familio. Oni scias ke la nun trošargita May Flower forveliris sole, septembron la 29an, 1620, transportante, krom la ŝipestron kaj ŝipanaron 34 Separatistojn, 18 edzinojn iliajn, dudek sub-21 jarajn gejunulojn, 19 laboristojn, kaj 3 servistinojn, entute 102 elmigrantojn. Oni scias ke duone trans la Atlantika kelkajn tagojn dum ventego ekvinoksa la ŝipo veliris kun mastaro nuda kaj ke fine ĝi tiom kreviĝis ke ĝi fleksiĝas meze kaj lasas akvon enflui per tiom da krevajoj ke eĉ la maristoj ektimas sed kiam oni firmigis la ferdekon kaj kalfatraris la krevajojn, "ili sin lasis al la Dia volo kaj decidis antaŭeniri," kaj ke unu matenon frue, sesdekse tagojn post foriro de Anglio, al ĉies ĝojejo oni ekvidis Cape Cod (Kapo Gado). Oni scias ke ili preteriris suden ĉar ilia landrajto troviĝas malproksime sude de Kapo Cod; ke ili sin trovis blovataj sur la rompitajn ondojn super la malprofundejoj laŭlonge de la kapo; tamen de ŝippereo savis ilin venteto kiu ekblovas posttagmeze; ke ili

Ĉangis la vojon kaj veliris al Provincetown Haveno, kiun per venteto ili atingis la proksiman tagon, Sabaton, Nov. 21, kaj ke ankoraŭ savigis ili "benas la Dion ĉielan kiu ilin transportis trans la vastan furiozan oceanon kaj ilin savis de ĝia ĉiu dangero kaj mizero."

Laŭ la interkonsento kun la Londona Kompanio la kolonio devas enlokigi sin sude de la rivero Hudson sur bordo de aktuala New Jersey aŭ Delaware. Ĉar la ĉarto de la Londona Kompanio ne pritraktis Novanglion, iuj—verŝajne la laboristoj—komencis anonci la ideon ke oni estas sendependaj de ies aŭtoritato. Por gardi kontraŭ aparta agado ties la gvidantoj decidis starigi regadon. Laue tiun tagon mem en la kajuto de la May Flower, kvardekunu el la kvindek tri viroj faris kontrakton memorindan kiel la unuan kontrakton socialan registratan kiu egale rajtigas ĉiun. Sur tiu kontrakto—ke oni subtenos ordon kaj subigos sin al la decidoj de la plimulto—baziĝos la leĝoj de la ekkolonio, kaj ĝi estis estonta la fundamento de leĝaroj respublikaj en Ameriko. Pliposte per agado elkonsiderita, tiun kontrakton oni enkorpigis en civila regado sur kiu baziĝos la graveco de Ameriko.

"Tiun saman tagon," skribis Winslow, "kiom baldaŭ eble ni surterigis 15 aŭ 16 virojn bone armitajn, kune kun kelkaj por alporti lignon ĉar neniom restas ĉe ni, ankaŭ por observi la teron kaj kiujn ajn enlogantojn ili eble renkontos." Dimanĉon ĉiu restis sur ŝipe, kie ili Diservis laŭ kutimo kaj donas dankojn al Li kiu estas ilin portinta sanaj tra tiom da dangeroj.

Nun rapide alproksimiĝis vintro kaj, ĉar la skorbuto kaj ŝipfebro sin montris en la May Flower, necese estas, oni opiniis, senhezite enlokigi. Sed pro la ofte sabla tero oni tute ne povis koloniigi ĉi tiun lokon. Ili sciis, tamen, ke ie apude Sipestro Martin Pring, negocadanta en 1603, laŭlonge de la marbordo de Massachusetts, restis ankrite dum kelkaj monatoj, kie li trovis bonan havenon kaj teron fruktodonan. Tial, se en malmultaj tagoj sekventaj ne troviĝus loko ankorau pli bona, ili decidis enlokigi sin tie. Lunden, kiam ili pretigis sin por komenci la serĉadon, Sipestro Jones de la May Flower rifuzis velvagi kun sia ŝipo pro tio ke li ne posedas karton de la tiea maro. Konsekvence ili decidis utiligi sian ŝalupon\* ŝipeto de 15 tunoj. Kiel skribis Winslow, "ni el ŝipigis nian ŝalupon kaj tiris ĝin teren por ripari kaj prepari ĝin ĉar oni devis fortranĉi de ĝi por enmeti ĝin inter la ferdekojn kaj ĝi multe kreviĝis pro ke oni kuſas en ĝi; kaj tion fari nin longe tenis ĉar trapasas 16 aŭ 17 tagoj ĝis kiam finis la carpentisto." Merkredon, dum oni riparas la boaton, Bradford kun aliaj—"entute 16 bone armitaj viroj, ĉiu portante paflon, glavon, kaj brustarmilon"—surteriris, sub komandanto Myles Standish, por esplori la landon. Apenaŭ ili surterigis sin kiam, cirkaŭirante promontoron ili subite renkontis ses Indianojn ilin alproksimigantajn laŭ la sablaro. "Unue oni supozis ilin S-ro Jones la ŝipestro kaj kelkaj siaj, ĉar ĉi tiuj estas surteriĝintaj sed kiam oni scias ilin Indianoj oni marĝe sekvis ilin." La Indianoj sekvataj kuris en la arbaron, kaj Standish kun liaj, esperante de ili iom lerni pri la lando, ilin sekvis tiun tagon tutan, kaj nokte, elektinte tri gardostarantojn por gardi ilin kontraŭ atako, trapasigis la nokton. La sekvantan tagon oni ree sekvis la

\* Ŝalupo—boatego kun velo por alporti ŝargon de tero al ŝipo.

postsignojn laŭ la sablaro kaj la Indianoj eksenciinte sin ankoraŭ persekutataj ree sin jetis en la arbaron, kie Standish kaj liaj subuloj ilin sekvante sin perdis en densejoj tiaj ke preskaŭ distiriĝis la armiloj. Tiun posttagmezon la esplorantoj revenis al la okcidenta bordo de la kapo kaj ekbruliginte fajron por sciigi al tiuj surſipe sian sanon, tranoktis. Dum tiu posttagmezo ili estis ektrovintaj sufice grandan lageton da akvo freſa; senarbigitan terpecon kie oni plantis maizon; kelkajn tombojn Indianajn; restajon de domo, verſajne konstruita de iu ſipanaro; kaj feran potegon. Ankaŭ ili estis trovintaj, apude al Pamet rivero, senarbejon kun maiztrunketoj ankoraŭ starantaj; kaj en tertruoj sub amasoj da sablo, kelkajn korbojn plenaj je maizo kiuj unuan fojon ili nun vidas. Vendredon forprenante kun ili iom el tiu maizo, ili ĉirkaŭiris laŭ la bordo la hodiaŭan East Havenon, sed nepovante sondi ĉar ne estas al ili boato, ili revenis posttagmeze laŭ la bordo al la May Flower.

London, Dec. 7, la ŝalupon pretigitan, 24 el la viroj ekiris por ankoraŭ esplori la bordon. Ŝipestro Jones kaj naŭ el la maristoj kuniris per la remboato de la ŝipo. Unue oni veliris al East Haveno; tiun oni sondis sed trovis netaŭga por kolonio ĉar ĝi ne havas sufice profundan akvon por ŝipoj. Tie oni tranoktis kaj la proksiman tagon veliris al Pamet rivero, por esplori la lokon kie oni trovis la maizon. Forirante ili kunportis ĉirkaŭ trionkilolitron da maizo kune kun iom da faboj same trovita de ili. Pliposte kiam ili rememoris la okazon kaj rememoras ke tiun posttagmezon mem, venis netravidebla pluvego kiuj malebligis la maiztrovadon, ili kredis ke Dia inspiro gvidis ilin tiun tagon. Pro tio ili eĉ pli konvinkigis ke en krizo ili estas sub Lia precipa zorgo.

Tiun posttagmezon Ŝipestro Jones revenis al May Flower per remboato sia, kaj 15 el la aliaj portis la maizon en la ŝalupo. La proksiman matenon reiris la ŝalupo kun aliaj viroj por plie esploradi la ĉirkaŭajojn de la Pamet rivero, kaj la sekvan tagon, mardon, ĉiuj revenis al la May Flower. Dum tiu vojaĝeto tiom malvarmege estiĝis ke iuj el tiuj kiuj mortos "tie ĉi akiris la originon de siaj mortoj." Dum tiuj du semajnoj oni vidis abundajn balenojn, fokojn kaj gadojn kaj tiom da ketacetoj ke oni pensas pri nomo "Grampus" golfeto por la haveno. Ankaŭ ili vidis la ruinojn de franca fiškapta ŝipo kiuj antau kvar jaroj surteriĝis; ankaŭ iajn dezertajn logaçojn Indianajn; tamen ĉar oni ne trovas bonan havenon nek suficien provizon da freſa akvo, ili revenis al la May Flower.

Car neĝo nun kovris la teron, oni elvokis virojn kiuj volas gisfunde esplori kapon Cod. El la volontuloj, Standish, Carver, Bradford, Winslow, kaj ok aliajn oni elektis; kune kun ili Ŝipestro Jones sendis tri maristojn, du ŝipsubestrojn, kaj piloton—entute 18 viroj. Merkredon, Dec. 16, kiam tiuj ekiras, la vetero estis tiom malvarmega ke la ŝprucajo de la ŝalupo glaciigas sur ilia vestaro, kaj, skribis Bradford en sia memorlibro, "iliaj vestoj similis ferajn vestojn." Tiun posttagmezon ili surteriĝis—kie hodiaŭ troviĝas Eastham—kaj, ĉar oni ekvidis Indianojn laŭlonge de la pasita bordo, ili konstruis el trunkoj, flosajoj kaj branĉoj pinaj, krudan fortikajon. Tiun nokton,

ĉar klare oni povas vidi fumon de tendejo Indiana ne kvin mejlojn for, ili postenis gardostarantojn. La sekvan matenon, dividinte siajn fortojn, iuj veliris laŭlonge de la marbordo en la ŝalupo dum la aliaj esploras la internan landon. Je sunsubiro novan dormlokon oni elekis ne malproksiman de la ripozejo de la antaŭa nokto, je loko hodiaŭ nomata Great Meadows Rivereto, al kiu venis la velboato je la maro plej alta. Ĉi tie ankaŭ ili konstruis portempan fortikajon, kaj farinte fajron je la centro, ĉirkaŭ ĝin kuſis dum la nokto. La sekvan matenon, "post preĝado oni pretigis matenmanĝon kaj, je tagiĝo ŝajnis dezirinde porti la ekipaĵon al la boato," ĉar pro la tajdo necesas irigi la ŝalupon el la rivereto je sunleviĝo. Laŭe ili plimulte prenis la pafilojn kaj demetis ilin sur la bordo kovrante ilin per siaj vestoj por ŝirmi ilin de la roso. Dum oni matenmanĝas en la fortikejo subite ekleviĝis strangaj krioj el la arbaro kaj unu el ili alkuregis, kriante "Homoj! Indianoj! Indianoj!" Nun ĉiu ekscitiĝis, kaj apenaŭ ili ekstaris kiam sagoj flugas inter ili. Du el ili, kiuj ankoraŭ havis siajn pafilojn tuj kuregis al enirejo de la fortikajo kaj komencis pafadi je la sovaĝuloj nun venantaj de la arbaro. Dum tiuj du tenas la fortikajon la aliaj kuregis al siaj pafiloj sur la sablaro. La Indianoj, opiniantaj siajn malamikojn forkurantaj, nun kriegis la venkon, sed post momento la esplorantoj revenis kun siaj pafiloj, kaj tuj ĉiu ekpafadis. Altan malblondan Indianon, la ĉefon, oni trafcelis, kaj kiam ĉirkaŭ li komencas flugi fendoj el la arbo antaŭ li, timigita li kriegis kaj kun la aliaj malaperis.

Dum tiu ekbatalo kelkajn vestojn penditajn sur arbobrancoj ĉirkaŭ la fortikaja enirejo multe truigis sagoj, tamen neniu viro estis traftita. Pro tio troviĝis neniu el ili kiu ne kredas ke la Dia providenco savis ilin ĉiujn.

Tamen ne nun finis la malfacilajoj. Ili estis forlasintaj la May Flower post, iliasupoze, la fino de nordorienta urugano, sed, dum ili laŭiris la bordon, ekfalis neĝo, kaj posttagmeze la ventego tiom furioziĝis kaj tiom ondigis la maron ke rompiĝas la direktalo, kaj ili devis direkti per remiloj. Sekve rompiĝis la masto kaj falante apenaŭ ne subakvigis la boaton, kaj dum momento ili sin lasis malesperaj. En tiu dilemo ili remis ĝis la tero, esperantaj ke kun la nuna alta maro oni povas surterigi sed la ondegoj estis tiom altaj ke oni ne povas atingi la teron; pro tio ili devis retroiri de la tero. Fine, horojn remin-taj, ili sukcesis sin ŝirmi malantaŭ insulo. Estis nun longatempe post noktiĝo, kaj timante alian atakon, ili hezitis pri surterigo sed ĉiuj estis tiom lacigitaj de la malvarmego ke la pli bravaj surteriris kaj ekbruligis fajron. Baldaŭ sekvis aliaj, kaj post nelonge ĉiuj dormadis pro tutlaciĝo. Sen scio ili troviĝis je la enirejo de Plymouth haveno—tiel nomita de Kapitano John Smith antaŭ ses jaroj—kaj fine estis atingintaj la longatempe serĉatan ankrejon de ŝipestro Pring en 1603. Tiun insulon ili nomos Clark's Insulo, ĉar Clark, subŝipestro de la May Flower, tiam estras la ŝalupon.

Tiun nokton ŝanĝigis la direkto venta. Matene, kiam suno ekbrilas, plivarmiĝis, kaj dankon doninte al Dio por sia saviĝo, la viroj tro lacigitaj por plua esplorado, trapasigis la tagon sekante siajn vestaĵojn kaj purigante siajn pafilojn. La proksiman tagon, dimanĉon, ili laŭ kutimo Diservis. Lunden, Dec. 11 (laŭ antikva kalkulo) aŭ Dec. 21 (laŭ aktuala kalkulo), sondinte la havenon Plymouth-an kaj trovinte bonan ankrejon, ili surteriĝis per la soleca rondstonego hodiaŭ la famekonata Plymouth Stonego. Jen la historia surteriĝo de la Pilgrimantoj, kaj ankoraŭ oni tenas la rondstonegon kiel memorajon de tiuj pioniroj de libereco kiuj helpis formi epokon. Dum la du postaj tagoj oni esploradis la landon, trovis kelkajn malarbitejojn kie la Indianoj plantis maizon; kelkajn riveretojn kaj kelkajn bonegajn akvofontojn. Kion plejmulte ili ŝatas estis monteto apudmara kie oni povos facile konstrui fortikajon kontraŭ atakoj Indianaj, ĉar ĝi superrigardas kaj havenon kaj teron ĉirkaŭan. Pasintaj unu semajnon kaj ŝatitaj de la observaĵoj, ili revenis trans la Golfeto de Kapo Cod al haveno Provincetown-a, for po 25 mejloj.

Post du tagoj, Dec. 25. (nova kalkulo), la May Flower veliris por Plymouth haveno, sed kontraŭaj ventoj aperis, kaj la ŝipestro ne kurigis boardi inter insuloj kaj landbordo tial la ŝipo restis ankre apud Gurnet promontoro. La proksiman tagon, sabaton, Dec. 26, kun favora vento ili veturis en Plymouth havenon, kie oni ankriĝas "ĉirkaŭ mejlon kaj duonon de" la tero.

La laborego de la May Flower plenumiĝis! Giaj traboj diskreviĝis, ĝiaj veloj "ĉifonitaj de ventegoj multaj kaj reparitaj de maristaj manoj," frapetadis la mastojn!

Kiam tiuj Pilgrim-antoj en Aŭgusto foriris el Lejden ili esperis konstrui siajn loĝejojn antaŭ la malvarmega vetero, sed la prokrasto kaŭze de la nemartaŭgeco de la Speedwell kaj la uruganoj renkontitaj dum la vojaĝo efikis ke ili alvenas la dezertan bordon de Nova Anglio je tempo kiam oni bezonegas ŝirmejojn.

Car ĉiuj volegis ekstarigi kolonion kiel eble plej baldaŭ, lunden matene oni sendis esplorantaron surteren, kaj oni interkonsentis ke post ties esplorado, ili preĝu por Dia gvido kaj tiam voĉdone decidu ĉu tiu estas la loko por la kolonio. Merkredon, kiam la demando estis decidata, kelkaj deziris lokiĝi en la loko hodiaŭ Kingston, sed tion oni determinis malpraktika car la arbaroj tieajn oni ne povos forigi suffice frue por la plantado. Aliaj proponis Clark's insulon sed oni respondis ke tiu ĉi estas ne nur dense arboplena sed ankaŭ malmulte provizita de akvo. La plimulto, kontraŭe, favoris koloniigo je la hodiaŭa Plymouth. Aldone al ties superecoj topografiaj, tiu loko estis bone provizita de akvo; la maizejoj Indianaj troviĝis pretaj al agronomio; fragujoj abundis kiel ankaŭ la sasafrasujo tiutempe altestimata de Eŭropanoj pro siaj supozataj kuracilecoj. Multnombraj diversspecaj sovaĝaj korbirdaroj vidiĝis kaj troviĝis je marbordo mitulejoj kaj lamelibrankejoj. Pro tioj oni elektis tiun ĉi lokon kaj tiun posttagmezon 18 el la pli entuziasmaj konstruis sur la sablaro barikadon kie ili tiun nokton dormas. Merkredon Dec. 30, do, estis la tago de la unua daŭra sidiĝo de la Pilgrimaj Prapatroj en la Nova Mondo.

## LA KOMENCO DE NOVA ANGLIO

Sabaton, Jan. 2, la pilgrimantoj komencis malembarasigi la teron por siaj domejoj. Dimanĉon, Jan. 3, la gardantaro de dudek viroj lasitaj surtere estis ekscitataj de kriego de nevidataj Indianoj; kankam oni preparis kontraŭ atako nenio okazis. Lundon, Dec. 25, laŭ malnova kalkulo, estis Kristnaska tago, sed ĉar edikto papa nomis tiun festtago religia ĉiuj Separatistoj denuncis ĝin kiel malkristanism. Diras la tagnotujo de Bradford, "Neniu viro ripozis la tutan tagon." Krepuske aŭdiĝis alia alarmo pri Indianoj, sed ree nenio okazis. Malgraŭ tio, por povi ĉatempe sin defendi oni decidis surmeti tuj iliajn kanonojn sur tribuno surmonteta.

Car oni opiniis dezirinde konstrui siajn domojn inter la monteto kaj la maro, oni elmontris straton kun domejoj ambaŭflankaj paralela al la fluo—hodiaŭ Town Brook ("Urbeta Rivereto.") Car ankaŭ oni decidas konstrui nur malmulte da domoj, la popolon oni dividis en deknaŭ grupoj, kaj por lokigi la domojn interne de fostfortikajo, la domejoj estis malgrandaj. Ankaŭ oni voĉdonis ke la etendo de ĉiu domejo estu laŭ la nombro da homoj kiu ĝin okupos, kaj ke oni elkal-kulu landeron longan de tri vergoj (18 metroj) kaj larĝan de duon-vergo (3m.) po ĉiu. Por malhelpi favoradon, oni voĉdonis ke oni elektu la domejojn per sorttiro, kaj ke ĉiu logantaro konstruu sian domon. Antaŭ, tamen, ol oni komencis unu el la domoj oni konstruis magazenojn por iliaj havajoj. Sekve konstruajon kvadratan po 20 futoj (7m.) por uzi kiel kultejon kaj generalan kunvenejon; ankaŭ oni ekkonstruis sep pajlumotajn domojn el ŝtipoj. Dum oni tiujn konstruas, iuj el la viroj logis surſipe en la May Flower, kaj iuj surtere por gardi la havajojn, ĉar oni konstante timas la Indianojn kiujn oni ofte aŭdas en la apudaj arbaroj.

Apenaŭ oni ekkonstruis kiam la ŝipfebro, jam komencinta, disvastiĝas. Estis la ofta tifa febro tiom trovata tiutempe, kaj jen la Pilgrim-antoj devis punpagi pro ke ili portis de Anglujo ne suficien provizon. Por malhelpi la malsanon, oni surterigis la plimulton de la malsanaj kaj metis ilin en la nekomplete konstruitaj domoj. Unutempe nur ses el la tuta kolonio restis sufice sanaj por flegi la aliajn.

Dum tiuj malfacilajoj Sipestro Jones de la May Flower ofte malgentilas al ili. Li kelkfoje minacis foriron al Anglujo, kaj kiam li ekscias ke la prokrasto pro la febro malsufiĉigis lian provizon da biero por la vojaĝo, ofte rifuzis donaci iom da ĝi. En tiu epoko, tian rifuzon oni konsideris gravega suferigo, ĉar sen lakto, biero estas la trinkajo de ĉiu uzata, pro tio ke Anglujo ne ĝis nun konas teon aŭ kafon.

Al la kolonianoj tiuj du monatoj, januaro kaj februaro, estis tre malkuraĝemigaj. Preskaŭ duono el ilia anaro mortis, kaj kiam oni enterigis ilin en la abrupta monteto hodiaŭ Cole's monteto), oni zorge ebenigis la teron por ke la nombron ne sciu la Indianoj, ĉar ĉi tiuj facile povas amasbuĉi la tiom malfortajn restantojn. Kelkaj el la ŝipoficiroj kaj multaj ŝipanoj ankaŭ mortis, kaj ĉar aliaj restas ankoraŭ malsanaj, la May Flower nesufice homekipita ne povis foriri.

Troviĝis nun nur 53 kolonianoj, inkluzive la virinojn kaj infanojn, tiuj ne estis (kiel hodiaŭ ofte opinias oni) grandaĝuloj, ĉar sole "la

plej junaj kaj plej fortaj” venis trans maron por ekstarigi la kolonion. La meza aĝo de tiuj unuaj almigrantoj, escepte de la geedzoj Brewster-a kaj Carver-a, verŝajne ne superis 25 jarojn.

Nun kvin edzoj restis vidvaj, unu edzino vidvino; ok geedzojn oni estis enterigintaj; kvar infanoj estis perdintaj siajn gepatrojn, tri la patrojn, kaj tri la patrinojn; krom du ĉiu familio estis perdinta anon. Jen la efiko de “la unua malsanado,” kaj nun restis nur 22 viroj, 5 edzinoj, 10 knabinoj, kaj 16 knaboj—kaj el la viroj 12 ne estis komuniigintaj de la Robinson-a eklezio.

Feb. 24, kunvenis la restantoj en ilia nekompleta kunvenejo, kie la unuan fojon en Ameriko oni praktikas ĉiuviran voĉdonadon. Voĉo de la plimulto elektis John Carver koloniestro kaj Myles Standish soldatestro. Kiajn leĝojn civilajn kaj militajn oni opinias necesaj por regadi la kolonion ili legigis. Post ne longe, tamen, iuj el tiuj senditaj de la Londonaj akciuloj ekgrumblis kontraŭ la severaj reguloj sub kiuj oni devas vivadi, kaj pro tio ke la kolonio troviĝas ekster la limoj de la ĉarto, komencis nei la rajton de la aliaj kontroli iliajn agojn.

Unu tagon brave enmarĉis Indiano en la kolonion, dirante balbute anglalingve, “Bonvenon!” Tiu estis viro kun rektaj nigraj haroj, mallongaj antaŭe kaj longaj malantaŭe kaj krom franĝita lumba peltzono nuda; liaj solaj mortigiloj estis arko kaj du sagoj, unu senpinta. Al ili li diris ke li nomiĝas Samoset; ke li estas ĉefo de Monhegan-a gento indiana; ke li lernis iom da angla lingvo de la maristoj kiuj tien venas por fiŝkapti; ke li estas dum ok monatoj sur Kapo Cod je vizito; ke la indiana nomo de ĉi tiea loko estas Patucket (=golfeto); ke antaŭ kvar jaroj la tuta gento Patukset mortis pro pesto; kaj ke nun neniu restas kiuj pretendas la teron posedi. Ankaŭ li diris ke Massasoit, ĉefo de la “Uampanoag”-oj, kies popolo enhavas 60 bravulojn, estas la ĉefestro (“sejcem”-ego) de la indianaj triboj sur Kapo Cod; ke ties precipa loĝejo estas Soūams, 40 mejlojn okcidente (hodiaŭa Warren); kaj ke la “Nauset”-oj, tribuso sudorienta kun 100 bravuloj estas tiuj Indianoj kiuj atakis ilin ĉar Sipestro Hunt, alveninte kun la ekspedicio de Kapitano John Smith en 1614, forprenis sep el iliaj bravuloj. La proksiman tagon foriris Samoset, kaj post du tagoj revenis kun kvin altaj fortkorpaĵoj Indianoj el la tribuso de Massasoit kiuj kun si portas da peltoj kastoraj—tiutempe pelto nekonata al la angloj—kiujn ili volas vendi. La kolonianoj, tamen, rifuzis aĉeti, ĉar estas dimanĉe, tial la Indianoj lasante la peltojn foriris, dirante ke ilia Ĉefego Massasoit intencas viziti la kolonion. La sekvantan lunden ankoraŭ venis Samoset, tiufoje kun Squanto (Skūanto), Indiano kiu pliposte devenos al la kolonianoj supervalora amiko. Squanto estis la sola restanto el la tribuso Patukset-a; li estis unu el tiuj kiujn kaptis Sipestro Hunt por vendi en Hispanio sed kiujn oni portis al Londono kie li lernas iomete la anglan, kaj de kie li pliposte revenis kun la ekspedicio de Sipestro Dermer. Li estis nun veninta kun Samoset por proklami ke Massasoit vojiras al la kolonio. Post ne longe oni vidis Massasoit kun multenombra gardistaro sia sur la krutajo de monteto sude de la vilaĝa rivereto; de tie li sendis al la kolonio peton ke unu el la kolonianoj oni sendu tien por interparoladi. Kvankam oni estimas

tion dangerega, Winslow volontis por iri. Portante kirason kaj zonarmilojn, tiu ĉi transiris la rivereton je la vadejo kaj grimpinte la monteton (hodiaŭ Watson's), malaperis en amason da Indianoj.

Certigante al Massasoit ke la kolonianoj deziras lin kiel kunliganon, Winslow lin invitis viziti la kolonion por paroladi kun ĉi ties estro pri traktato kiu profitos al ili ambaŭ. Lasante Winslow kiel garantiulon, kaj kunirigante 20 militulojn Massasoit malsupreniris la monteton kaj lin renkontis je la transvadejo Standish kaj Allerton kaj ses aliaj kirasitaj viroj. Tiam oni donis saluton militistan al Massasoit, kaj tion farinte, oni lin kondukis al la domo de renkontado.. Massasoit estis viro je aĝo plej bona, kun severa mieno kaj kun malmulte da vortoj, kaj, montrita ĉian komplezon de la kolonianoj, li kun ili faris traktaton interkonsentante ke neniu partio ekmilitu la alian, kaj, ĉe iu komploto Indiana kontraŭ unu el ili, ke la alia devas helpi ĉiel eble. Estis ankaŭ konsentate ke oni estimu la terpecon, kiun antikve okupadis la estinta tribuso Patukset-a, la tero de la kolonianoj. Tiu memorinda traktato elfarita April 1, 1621, asekuris al la kolonianoj vivadon senriskan dum 55 jaroj, kaj estis traktato pli sankte plenumota ol multaj inter nacioj kristanaj.

Pliposte en Aprilo, alvenis la mateno kiam rigardata de tiuj kuragemaj, la ŝipanaro de la May Flower malankrigas. Nenia unu el ili estis petinta ke oni reakceptu lin sur ŝipon; kiam la ŝipo veliras el la haveno, ĉiuj flirtadis adiaŭegon de la supro de la monteto, dum ĝi preterpasas Gurnet promontoron kaj algustigas la velaron por Anglujo.

Novanglia civilizacio nun estis efektive komencata. La najbaroj plej proksimaj norde estis la malamikaj francoj, 500 mejlojn malapude en Nova Scotio kaj sude la neamikaj angloj Konformistaj, malapude 500 mejlojn je la James rivero. Oni povas imagi la tiutempa kolonion— la sep pajlumitajn domojn el ŝtipoj laŭlonge de ilia sola strato; la renkontejan domon je suba fino de la strato kie observiĝis iliaj diservo; la ŝalupon flanke al la kajo kie je la elirejo la rivereto plilarĝigas en golfeton; la senarbigitejon kun nigraj trunkradikoj; sur la deklivo sube de la monteto, la enterejon de iliaj 46 kun-anoj je rando de senarbejo; kaj la ses kanonojn sur planko sur la monteto kun apuda krude konstruita observoturo.

Oni scias ke dum aprilo mortis John Carver, kaj ke oni elektis koloniestro William Bradford, ne tute resaniĝintan de la febro, kaj nomis Allerton lia helpanto; ke Squanto nun eklogis ĉe ili, kaj montris al ili kie en la urba rivereto oni povas plej facile fiškapti. Oni scias ke la sankorpaj viroj tiam laboris en la maizejoj, pretigante la teron por kreskajoj kiuj donos al ili mangajon la proksiman vintron; ke la tritikon kaj pizon alportitajn de Anglujo oni sekve plantis kaj pliposte la maizon trovitan en decembro—ĉar Squanto diras al ili ke oni devas tion fari kiam la kverka folio estiĝas granda kiel orelo de kunklo.

Post vizito de Winslow kaj Hopkins al Massasoit, Hobomok, unu “pinesse” (t.e. konsilanto) de la tribuso de Massasoit, aligis sin al la kolonio kaj sin pruvis ĝis sia morto fidela amiko. Ĉar li estas grandkorpa kaj lia kuraĝo bonekonata de la apudaj Indianoj, oni sendis lin por negocadi ĉe la “Pokaset”-oj, tribuso 14 mejlojn de la maro. Pro

sia amikeco al la angloj Hobomok kaj Skūanto estis atakataj de tiuj Indianoj, kaj Hobomok forkurinte revenis al la kolonio lasante Skūanton kaptita. La kolonianoj, informitaj de Hobomok pri kio okazis, tuj sendis Standish kun dekkvar viroj por savi Skūanton, ĉar ĉiu scias kiel efikus je ĉiu Indiano se tian perfidon oni permesus sen agado. Oni scias ke Standish kaj liaj viroj ĉirkaŭis la indianan vilagón kaj ke ilia militema aspekto tiom timigis la Pokaset-ojn ke la Indianoj liberigas Skūanton kaj promesas estontan konduton bonan. Tiu malprokrasta ago de la kolonianoj, sendi kelke da viroj kontraŭ fortikejo indiana, montris al la Indianoj kun kiaj viroj oni devas kalkuli, kaj ĝi tiom akiris la estimon de ĉiuj la Indianoj de Kapo Cod, ke kelkaj ĉefoj petas al Massasoit ke li faru por ili kunligon kun tiu batalantaro tiom timinda ili sin montris. Rezultatis ke oni multe pli taksas la kolonion tiuregione kaj la kolonianoj, havante nun amikemajn rilatojn kun ĉiuj tribusoj, povas komercadi gajnige per la vendajoj portitaj en la May Flower.

Car estus helpo al la kolonio starigi amikecon kun la antikve fortega tribuso "Massachusetts"-a, septembron oni sendis Standish kaj dek el la kolonianoj kun Skūanto kaj du aliaj Indianoj kiel gvidantoj per la ŝalupo al Massachusetts Golfeto, tiama nomo de la Bostona haveno.

La novajo de ilia alveno ilin antaŭeniris. Ili ektrovis kelke da dezertaj tendoj, kaj je unu loko renkontis de Indianinoj kiuj sukcesas decidigi unu bravulon sin aperigi, tamen nur kiam li certigis ke tiuj fremdoj ne alvenis pör malutili al li aŭ lia popolo, li do ŝancelanta kaj tremanta pro timo aperis. Car ili ne povis ekscii kie troviĝas la "ina estro", nur ke "Si troviĝas malproksime," ili revenis al la boato, akompanataj de la inoj kiuj deziregante negocadi "vendadas siajn vestojn de siaj dorsoj kaj ligas branĉojn ĉirkaŭ si, sed honteme, ĉar verdire ili estas pli modestaj ol iaj niaj anglinoj." Tiun nokton kun helpa vento kaj plena luno la viroj foriris por Plymouth kiun oni atingos la sekvantan tagmezon.

Ci tiu vojaĝo estis la unua registrata esplorado de Bostona Haveno.

Irante kaj venante oni transiris la tutan golfeton, notante ĝian etendegon kaj ĝiajn multajn insulojn. Tial de la raportoj rakontataj de ili je Plymouth ne estas strange ke ĉiuj ne povis ne "deziri ke ili tie lokiĝis."

Dum tiu aŭtuno oni rikoltis la rikolteton, negocadis kun la Indianoj, al si provizis anasajon, meleagrajon, kaj cervajon por la vintro, kaj fabrikis murŝindojn sendotajn al Anglujo. Ili jam estis komencintaj funkcii kiel tute evoluinta ŝtato, elektintaj oficistojn, farante leĝojn, organizante militistaroon, starigante negoc-rilatojn kun la Indianoj, kaj traktante traktaton atakan kaj defendan kun la liganoj Indianaj. Je grado malgranda, tiel, ili estis starigintaj komunumon demokratan kaj tiun sukcese evoluigantaj. Ilia maiza rikolto malspare repagis al ili por la laboro elspezita, la tritiko alportita de Anglujo iome produktis, kaj kvankam la pizo-rikolto ne sukcesis, ili povis satitaj retrorigardi sian unuan jaron en tiu nova lando.


Por memorigi la laboron de la jaro, ili elprenis unu tagon por publiko festeno, kaj al sia festeno invitis sian indianan kunliganon Massasoit, kiu alvenas kun naüdek bataluloj. Tiu festa kunveno de 53 blankaj kolonianoj, inkluzive la virinojn kaj idojn, kun 91 Indianoj iniciatis la Tagon Dankdonadan, unuafoje okazante en Novanglio. Pri tiu festeno dankdona Winslow skribis, "Nun ke nia produkto rikoltiĝis, nia koloniestro sendis kvar virojn por birdajo, por ke ni povu laŭ aparta maniero ĝojadi kune post kiam ni kolektis la rezultaton de niaj laboroj. Tiuj kvar dum unu tago mortigis tiom da birdoj ke ĝi satigas la kolonion preskaŭ tutan semajnon. Tiutempe, inter aliaj ludoj ni ekzercadis niajn batalilojn; multe da Indianoj venis inter ni, kaj kun ili ilia reĝa mošto Massasoit kun ĉirkaŭ 90 viroj kiujn ĉi dum tri tagoj ni distras kaj regalas kaj ili eliris kaj mortigis kvin cervojn, kaj tiujn ili portis al la plantejo kaj donacis al nia estro kaj al la kapitano kaj aliaj."

Nov. 19, la "Bonsorto," ŝipeto de 55 tunoj, neatendate alvenis kun 35 novaj kolonianoj inter kiuj la plej aĝa filo de Brewster; John, frato de Winslow; kaj Robert Cushman. El tiuj novaj venintoj la plimulto estis fortaj malglatuloj, sed malmulte da ili eltaksis la se verecon de la entrepreno kiun ili eniras. Ili portis kun ili patenton de la Novanglia Kompanio, elfaritan per la nomo de John Peirce, unu el la Londonaj akciuloj, enhavantan la regionon kie oni troviĝas, sed ili ne kunportis provizon da mangajo. Post du semajnoj foriris la "Bonsorto" al Anglujo, kaj Cushman, kiun sendis la akciularo Londona por esplori la aferojn koloniajn kaj por konsentigi se eble la kolonianojn al la artikolo en la kontrakto rifuzita je Southampton, reiris per ĝi, kunprenante ŝarĝon de ŝindo, de sasafraso, kaj du oks-hoftojn de peltoj lutraj kaj kastoraj. La reirantan ŝipon kaptis la francoj tiam militante kontraŭ Anglio, kaj ĝian ŝarĝon konfiskis, sed permesis al la ŝipo kaj homoj en ĝi revoji al Anglujo. Kvankam tiu pionira ŝargo de la infana kolonio perdiĝis, pro kio la akciuloj ricevas nenion por ilia unua jaro de penado, la kolonianoj, malgraŭ siaj mal-kuraĝigajoj kaj perdego nombra, estis montrintaj ke ili konscience laboras por la kompanio.

Car ili devis reekipi la Bonsorton kun mangajo por la revojaĝo, kaj plie devos provizi mangajon al la novaj kolonianoj, oni taksis la restantan provizon kaj trovinte ke ne restas sufice da maizo por ilia provizo ĝis rikoltiĝos la sekva rikolto, oni juĝis necese ke oni disdonu al ĉiu nur po duonporcio. Pro tio ili de nun devis vivsubteni sin grandparte per fiŝajo kaj kiom da ĉasajo ili povas akiri. Tamen kun tiu nemulta nutraĵo ili senĉese laboradis tra la vintro kun bona sano kaj spirito nelasita.

Unu ekvido kiun ni ricevas de ilia ĉiutaga vivado evidentigas la seriozecon kun kio oni ĉion entreprenis. Estis Kristnasko matene, kaj Bradford kaj la aliaj ekiris laŭkutime al la laboro, kiam la nove alvenintaj rifuzas iri ĉar estas Kristnasko. Aŭskultinte ties kontraŭ-dirojn, Bradford diris al ili ke, se estas afero de konscienco, oni ne devas labori. Tamen, kiam, revenante tagmeze Bradford eksiciis ke tiuj spite de siaj skrupuloj festis la antaŭtagmezon—iuj kun vetoj

jetante baron feran kontraŭ stangon, kaj aliaj vetludante pri ludo de skabelpilklo—li diris al ili ke li ankaŭ konsciencon havas, kiu ne permisas al li lasi ilin ludantaj kiam laboras aliaj, kaj forprenante de ili fandajon kaj pilkon, ordonis al ili resti endome kaj observi la tagon per taŭga servado se ili ĝin estimas sankta. Tiu admono finis la aferon, kaj post tagmezo tiuj eklaboris kaj neniam ankoraŭ petis libertagon ne festatan de ĉiu.



Ni esperas doni ankoraŭ unu numeron pliposte al la Pilgrimantoj por rakonti la pluajn malsatojn de 1622 kaj 1623; la alvenon de alia kolonio kiu starigis je Weymouth, kaj la Indianan konspiron kiu minacis ekstermi la tutan blankularon de Novanglio; la disdonadon de tero inter la kolonianoj; la danĝerajn komplotojn de Lyford, Oldham, kaj Episkopismaj kolonianoj; la açeton de la rajtoj de la akciuloj en Anglio; la fișentrepreneon je Gloucester, kaj pliposte la peltaĉetadon kaj starigon de negocejo apud Buzzard's golfeto; kaj fine la riĉigón de la Plymouthanoj pro la uzado de "wampum" globetoj, kaj pro la alveno de multaj malbone provizitaj Puritanoj al kolonioj laŭlonge de la marbordo norde.

**MISERERE** (Wagnalls) kaj **THAIS** (France)

**La AKROBATO de Nia Sinjorino**

**BLANCHE, la Virgulino de Lille** ( Schubin )

**La ROZUJO CIUMILJARA** ( Wagnalls )

**MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo**

dum la Milito ( Giesy )

Po \$ .35.

La unuaj eldonajoj tradukitaj de

**S-RO EDWARD S. PAYSON**

Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko

Aĉeteblaj ĉe la Esperanto Office,

Po \$0.35

Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

**POR UNU DOLARO VI RICEVOS**

rekomendite senditajn

kvin esperantajn librojn literaturajn eldonitajn en Hungarlando! Ne konitaj en Ameriko! Sendu la monon aŭ ĉekon pri ĝi al Paŭlo Balkanyi, VI Hajos-u. 15 II, Budapest VI.

Hungara Esperanto Servo—kolekto, interŝanĝo, vendo de glumarkoj, afișoj, insignoj, kaj ciuspecaj esperantajoj.

**THE WRITER'S MONTHLY**

Edited by J. Berg Esenwein

A magazine of real help for those who write. Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it is practical."

Single copies 15 cents ... \$1.50 a year

THE WRITER'S MONTHLY, Dept. A  
Springfield, Mass., U. S. A.

**ATTENTION! ESPERANTISTS!**

**The LLANO PUBLICATIONS**

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work. It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

**LLANO CO-OPERATIVE COLONY**

Leesville, Louisiana.

**—!PROPAGANDA PACKETS!—**

1. Primer of Esperanto, O'Connor.—regular list price: \$0.10.
2. Handy Vocabulary, O'Connor. — regular list price: 0.10.
3. Kolomba Premio (or La Mopso de Lia Onklo).
4. One other piece of Esperanto literature (our selection).
5. "Teacher's Number" of A. E.

Together these catalogues \$0.50; we will sell four packets for \$1.00.

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

**DEZIRAS KORESPONDI**

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poštaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

Armand B. Coigne, 193rd Street and Creston Avenue, New York, Usono. Deziras koni personojn interesatajn en int. asocio por psika enketado kiel helpontoj kaj avizantoj. Ne korespondos pri psikismo nek ia temo escepte la asocion, kaj NE RESPONDOS al PK kaj PM kolektantoj.

S-ro Jonas K. Miliauskas, Dideye Vilniaus G-ve, No. 34, Kaunas, Lithuania, Europe.

S-ro Arthur Cummings, 718 Twelfth St., N. W., Canton, O., per P. K. il.

S-ro Vladymir Kosytsin, Siberia, Vladivostok, Russia, dez. kor. I. P. K., interšanĝas P. M.

S-ro Franz Rohrig, Schlosstr. 6, III, Frankfurt A. M. West, Germanio.

S-ro Hideo Jagi, Dai 3 Kotogakko, Kioto, Japanujo, deziras korespondi per I. P. K. kun ĉiulandanoj.

S-ro Inocene Gross, Houškova 32/1, Plzen, Čehoslovakio.

S-ro N. Rudnicki, U. E. A. no. 7149, Taškent, Centra Azio, renove korespondadas, tuj respondos.

S-ro Bruno Colivicchi, Volaterra, Italio, P. M., I. P. K.

S-ro Emil Friebel, Residenzstr. 24, I, Dobritz-Dresden, Germanio.

S-ro Albert G. Bruce, 1018 Virginia Ave., Indianapolis, Indiana, Usono.

S-ro Peter Meszaros, Zombar, Jugoslavio.

S-ro C. H. Gibbons, Biblia Kolegio, Boone, Iowa, Usonia.



*La  
“Cherita  
Grand”*

2  
*Longa*  
56  
*Colojn*  
S

Kiel Esperanto, la universala lingvo, entenas en si ĉiujn el la plej bonaj elementoj de ĉiuj lingvoj kaj prezentas novan kaj tute apartan peron, tiel ankaŭ la “Cherita Grand,” eltirante el diversaj fontoj, montras tre unikan instrumenton; la plej malgranda “Grand.”

**EMERSON PIANO CO.**

[Fondita 1849]

EDWARD S. PAYSON, President

**Boston, Mass., Usono**